



ĜENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

LITERATURA VIVADO: Sully Prudhomme, de *Pro Buquet* kaj *Odilino Prudent* (FRANCUJO).

TRA LA MONDO: Passau, la bavara Venezia, de *Zacherl Karl* (BAVARUJO).

TEATRO: Kaprico, de *Alfred de Musset*, tradukita de *J. Flourens* (FRANCUJO).

ĈIULANDA VIVADO: La belgaj beginejoj, de *A. Van der Biest-Andelhof* (FLANDRO).

MILITISTARO kaj MARISTARO: Submarveturado, de *Marcel Finot* (FRANCUJO).

DIVERSAĴOJ: Eduardo, reĝo de Britujo, de *A. Brown* (SKOTLANDO).

TURISMO: Tendsporto, de *L. de Guesnet* (FRANCUJO).

ĈIULANDA LITERATURO: El kuraceja vivado, de *Sino Hulanicka* (POLUJO). — Por paroli angle, el la PORTUGALA lingvo.

DIVERSAJ SCIENCŬOJ: Grafologio, de *H. Laisney* (FRANCUJO).

PRI ESPERANTO: La Kvara, de *la Kvaro* (GERMANUJO). — Bibliografio, Kroniko, de *A. Montrosier* kaj *Steletto*.

MIKSAĴOJ: Ludoj, Konkursoj...



Jara abono: 8 fr. (3,20 Sm.) ĉiulande — Duona: 4.50 fr. (1,80 Sm.)
La abonoj komencas en Januaro, Aprilo, Julio, Oktobro.

Oni bonvolu sendi la monon poŝtmandate — Nur de landoj ne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago de specimenoj, ni akceptas poŝtmarkojn laŭ ilia efektiva valoro.

Internaciaj RESPOND-KUPONOJ estas akceptataj kiel 25 cent (10 Sd.).

CAROLINE
1907. OXFORD, EN.

«Tra la Mondo» aperas REGULE KAJ AKURATE monatfine krom en Aŭgusto.

ATENTU, Sinjorino


vi ekdikiĝas, kaj dikiĝi estas maljuniĝi. Prenu do ĉiutage du drageojn da **THYROIDINE BOUTY**, kaj via talio restos aŭ reiĝos svelta.

La flakono da 50 drageoj estas sendata aŭ franko de la: **Laboratoire, 1, Rue de Châteaudun, Paris**, kontraŭ poŝtmandato de 10 fr. Kuracado sendanĝera kaj nepre efika.

Oni zorgu precizi: **THYROIDINE BOUTY**.

ASP KANDELLANTERNOJ

por Biciklistoj



Malgranda, Malpeza, Oportuna, Pura, Neestingebla en Ventego, Funkciadas bonege nur kiam oni uzas la por ĝi

Konstruitajn ASP-Kandelojn

145.000 Lanternoj jam venditaj!

Kostas: 4 danajn kronojn, = Spes. 2,20

kun lenso 5 kronojn, = » 2,75

18 Kandeloj kostas 1 1/2 kronojn = » 0,83

SENDOTA ĈIEN DE


O. F. ASP, Kopenhague, DANUJG.

ANGLUJO

Propraj Kondiĉoj.

Generala Agento:

Sro G. RUTTER, 30, Red Lion Squar, LONDON.



VIVO DE JESUO

de ERNEST RENAN

laŭ la 78^a milo franca tradukis

EMILIO GASSE

Mendebila ĉe ĉiuj librovendistoj, ĉe Emilio Gasse, 77, r. Ernest Renan, Havro, Francujo, kaj ĉe liaj korespondantoj:

British Esperantist, Germana Esperantisto, Ruslanda Esperantisto, Esperantisten, kaj Sro Karl Jost, Fröhlichstr., 40, Zürich (Svisujo).

REABONO.

Niaj legantoj, kies abono finiĝis, ou finiĝas jarfine bonvolu TUV reaboni.

REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

Ĉiuj korespondataĵoj, mendoj, k. a. devas esti senditaj nur al nia administracio por eviti erarojn aŭ prokrastojn. Oni ankaŭ abonu aŭ reabonu senpere pro la sama motivo.

Adreso: Gazeto « Tra la Mondo », Meudon (S. et O.), France.

Urĝaj sciigoj: REKLAMOJ, ANONCOJ, k. a. devas alveni antaŭ la 10^a de ĉiu monato, por la tuj elironta N^o.

POR ESPERANTO ★ POR ESPERANTISTOJ

Vera

Vino Campanja

PETU

LA

ORA MARKO.

Originala Produktejo de
FORTIN PÈRE & FILS en EPERNAY (France).

SENPAGAN TARIFON

GALA PETER

LA
ĈEFA
ĈOKOLADO KUN LAKTO
EN LA MONDO

D. PETER, Kreinto, VEVEY (Svislando).

TARIFO DE NIA PUBLIKIGADO.

Prezo je la linio	ANONCOJ: (33 literoj)	Por unu anonco:	0 fr. 75 ĉiulinie.
		Por 3 anoncoj almenaŭ	0 fr. 60 —
		Por la tuta jaro	0 fr. 50 —
	REKLAMOJ (50 literoj):	2 fr. 50 ĉiulinie.	

Prezo je la paĝo (1 paĝo = 432 om. kv.)

	1 paĝo	1/2	1/4	1/8	1/16
Por unu anonco:	100 fr.	58 fr.	32 fr.	18 fr.	10 fr.
Por 3 anoncoj almenaŭ:	80 fr.	46 fr.	26 fr.	15 fr.	8 fr.
Por la tuta jaro:	50 fr.	30 fr.	16 fr.	9 fr.	5 fr.

Sendi la tekstojn kun la menda kosto al « Tra la Mondo », Meudon (S. & O.) France, antaŭ la 10^a de ĉiu monato por la numero eliranta je la fino de l' monato.

NE KOMERCAJ ANONCETOJ.

1,25 fr. por 4 linioj enhavantaj ĉiu 33 literojn minimume. Ĉiu plua linio komencita kostas 0 fr. 25.

Pro la distlegado de « TRA LA MONDO » EN LA TUTA MONDO, tiuj anoncoj mal-karaj estas tre rekomendataj al la multaj filatelistoj kaj poŝtkartaj kolektistoj; pli ĝenerale al ĉiuj kolektistoj kaj al ĉiuj dezirantaj uzi Esperanton por havigi rilatulojn en fremdaj landoj, aŭ por dokumentiĝi; ni rekomendas ankaŭ tiujn anoncojn al la grupestroj dezirantaj interrilatiĝi kun fremdaj samideanaj grupoj, kaj al la Esperantaj profesoroj, kies studentoj deziras trovi fremdajn korespondantojn por perfektigi en la lingvo per la internacia interkorespondado.

FERVOJOJ DE PARIS-LYON-MÉDITERRANÉE.

De Paris Orienten (tra Marseille).

La Kio P. L. M., konsentinte kun la Kioj Messageries Maritimes, Fraissinet kaj Paquet, liveras biletojn simplajn (irajn), uzeblajn dum 45 tagojn, por veturi, tra Marseille, de Paris ĝis unu ajn el la sekvantaj havenoj: Alexandrie, Beyrouth, Constantinople, Le Pirée, Smyrne, Alexandrie, Jaffa, Port-Saïd, Batoum, Salonique, Odessa, Samsoun, k. t. p.

La oficejoj de la Kio Messageries-Maritimes liveras biletojn irajn kaj reirajn uzeblajn 120 tagojn por veturi, tra Marseille, de Paris ĝis Alexandrie, Port-Saïd, Jaffa, Beyrouth, Smyrne.

Haltoj laŭvolaj laŭ la vojaro P. L. M. (per Bourgogne aŭ Bourbonnais).

Tiuj biletoj donas rajton je senpaga transporto ĝis 30 kg. da pakajoj por ĉiu vojaĝanto sur la vagonaro; sur la ŝipoj, tiu senpageco altiĝas ĝis 100 kg. por 1^a klasa loko kaj 60 kg. 2^a klase.


Por pluj sciigoj, legu la Gvidlibron-Horaron P. L. M., aĉeteblan 50 centimojn en la stacidomoj de la Kio.



DIVERSAĴOJ



La Bavara Venecio.



PASSAU EN LA MEZEPOKO.

Per mirinde bela situacio la favorema naturo estas beninta Passau'on, kiu, certe ne malprave, estas nomita la « Bavara Venecio ». Tri grandaj riveroj, nome la kvieta kaj grandioza Danubo, la fiera kaj vivega Inno, kaj la nigrokula kaj modesta I'co, ĉirkaŭprenas sin ĉi tie, kaj kreas plej pentrindan situacion, kiu fariĝas ankoraŭ pli ĉarma per la ĉiuflanke starantaj montoj. Ĉio tio prezentas ensorĉan ĉarman pejzaĝon.

Jam la antikvaj Romanoj admiris ĉi tiun naturbelajn, sed samtempe ili konis ankaŭ la militan gravecon de tiu ĉi loko, kaj fondis ĉi tie « Castra Batava ». En la jaro 737^a Passau fariĝis episkopejo. Por pli detala sciigo pri ĝia historio vere interesa mankas bedaŭrinde ĉi tie la spaco. Mi diros nur ke tie en 1552, estis subskribata la « Passaŭa Kontrakto » inter Kar'lo V^a kaj la protest-

6.5
x10
65
x8
520
1

antaj princoj. En la jaro 1803^a Passau ĉesis esti suverena princejo, kaj fariĝis landero de Bavarujo. Dum la militoj de Napoleono I^a tiu ĉi imperiestro mem venis kelkfoje en tiun urbon.

El la multenombraj kuriozaj vidindaĵoj estas aparte citindaj la belega ĉefpreĝejo, la episkopejo, la magistrata domo, la fortikajo « Oberhaus », la gimnazio (antaŭe fama kolegio de jezuitoj), k. t. p.

La pejzaĝoj ĉarmaj, multenombraj en la urbo mem, etendiĝas ankaŭ sur la belega ĉirkaŭaĵo. Akvoriĉaj valoj kaj supraĵoj senarbaraj, ombraj arbaroj kaj riĉegaj kampoj alternas en ŝanĝo multkolora. Al ĉiu amiko de la bela naturo prezentigas sennombraj ekskursoj kaj promenadoj ĉarmegaj. Ofta celo de ekskursantoj estas la multvizitata bankuracejo « Hals », kie ekzistas ankoraŭ ruino de antikva kastelo de malbonfamaj rabkavaliroj. Alia ĉarma loko de la ĉirkaŭaĵo estas « Freuden-hain » (= ĝojplena arbareto), pensio de junulinoj, inter kiuj troviĝas multaj eksterlandulinoj. Freuden-hain, antaŭe kastelo, kuŝas en ensorĉa kaj higiene tre favorita situacio, kaj havas bonegan direkcion. La prezoj estas tre moderaj.


Se oni volus citi ĉiujn kuriozaĵojn de Passau, oni devus skribi tutan bibliotekon. Tial mi konsilas al la estimata geesperantistaro viziti mem tiun ĉi juvelon, kaj ĉiuj estos kontentaj, vidinte ĝin. Sed ankaŭ pri la korpaj ĝuoj oni mirinde zorgas ĉi tie: multaj bonfamaj bierfarejoj elfluigas la gloran bieron bavaran, kaj malsoifigas per tiu ĉi bruna suko — kiu, nekontraŭdireble eĉ la dolĉan nektaron de la Olimpaj dioj superas — la ĉiam soifantan homaron; kaj sub la tegmentoj de Passau reĝas ĝoja bonhumoro kaj gaja memkontenteco.

Originale verkita de
ZACHERL CHARLES,
(Bavarujo).

Korajn dezirojn

ni sendas al nia Majstro, al ĉiuj niaj legantoj, al niaj kunfratoj, okaze de la nova jaro. Ĉi estu favora por nia kara lingvo.

«Tra la Mondo».



RUINOJ DE L' KASTELO « HALS ».

10.5
3
5.25
8
420
1

La Grafologio.

Antaŭ kvindek jaroj la grafologio estis preskaŭ nekonata. Unufoje, mi kredas, abato Michon donis en la jaro 1872 tiun ĉi nomon al la studado de l' homa karaktero per la skribado. Tiu scienco poste populariĝis, kaj ĝia disvastiĝo pligrandiĝis ĉiutage. Tamen sen ia dubo estas interese trakti la grafologion, ekkoni ĝian devenon kaj fine scii, ĉu ni dece povas nomi ĝin scienco, kiel oni nuntempe diras. kaj ĉu vere ni povas kredi la virtojn, kiujn ĝi ŝajnas posedi.

Sed unue: kio estas la grafologio?

La respondo estas ja tre simpla: ĝi estas la rimedo, por ekkoni la karakteron de la persono per ĝia skribado. Multaj personoj eble aldiros, ke tiu pretendo estas tro infana, kaj devenas de la ĉarlataneco. Por konvinki ilin, ni tuj rezonos kune pri la ĝustaj kaj precizaj observadoj, kiuj havigis al la elpensintoj de la grafologia arto la ideon, doni al ĝi fundamenton vere sciencon kaj nedisputeblan. Tiu ĉi fundamento de la grafologio estas la fiziologio.

Nia voleco loĝas en nia cerbo, kiu movas nian korpon per la nervaro. Tiu ĉi alportas al la cerbo la eksterajn sentaĵojn, kaj plie farigas la movojn volitajn de nia volo kaj ordonitajn de nia cerbo. Tiuj movoj produktas la fizionomian esprimon, nomitan « gesto » Do la gesto estas, laŭ tio, kion ni ĵus diris, la preciza materia esprimo de la volo, kiu dependas de la karaktero. Oni nepre ne povas tute aliformigi siajn naturajn gestojn, kaj en la fizionomio de ĉiu individuo ni vidas multajn tiajn gestojn eĉ malgrandatajn, kiuj estas tre propraj, tial ke ne ekzistas du similaj karakteroj. Ĉu ni ne provas diveni, kiam ni vidas unufoje personon, kian karakteron ĝi posedas, laŭ la esprimo de ĝia fizionomio, unuvorte laŭ ĝiaj gestoj?

La brakoj estas preskaŭ ĉiumomente movataj; iliaj gestoj estas multenombraj; la manoj precipe havas delikatajn kaj malsimplajn movojn, dum oni skribas. Tiam la mano nur plenumas la ordonojn de la cerbo, kaj ĝiaj gestoj estas la ĝusta esprimo de la volo, de kiu ili devenas. Kiel mimike, ili rilatas al la sentemo kaj al la karaktero, ĉar la plej malgranda impreso naskas nevolan geston, kiu lasas postsignon en la skribaĵo.

Oni facile komprenas, ke nevasta inteligenteco estas videbla en sia malrapida kaj mallerta skribado; kontraŭe, laŭ rapida skribado oni divenas lertan skribinton; sammaniere zorgemulo zorge skribos, kaj fuŝemulo havos malbelan skribadon.

Dank' al multaj tiaj observadoj, longe kaj pacience studitaj, oni iam povis starigi sur vere serioza kaj scienca fundamento la grafologion, tiun sciencan, kiu sola ebligas la konon de l' homa animo.

La perfektigaĵoj laste trovitaj ebligas nun, koni ne nur ĉiujn detalojn pri la inteligenteco kaj la karaktero de ĉiu persono, sed plie ĝian fizionomion; eĉ kiam la skribinto estas malsana, oni divenas per lia skribado, kiam malsanon li havas. Sed ni ne forgesu diri, ke por igi bona grafologiisto, oni nepre devas longe kaj serioze studadi laŭ la plej spertaj el la elpensintoj de la grafologio kaj aliaj traktintoj, pri kiuj ni tuj parolos.

* * *

Kvankam la grafologio estas scienco preskaŭ nova, ĝia



SCIENCAMA REĜO.

Reĝo Oskar IIa mortis. Lia unua naskito lin postreĝas sub la nomo Gustavo Va. Ni sendas al niaj svedaj amikoj, samtempe korajn kondolencojn kaj sincerajn gratulojn: Reĝo mortis, vivu la Reĝo!

« T. I. M. »

La princo, kiu ĵus malaperis, akiris de longe la estimon kaj respekton de ĉiuj, per la indeco de vivado utiligita en la konscia plenumo de l' regnestraj devoj.

Li amis la literaturon kaj ankaŭ multe la sciencan. Li kuraĝigis, kaj monhelpis la ekspedicion de Nansen al la norda poluso, kiel li estis subteninta Nordenskjöld.

Li estis patriarke simpla, kiel ĝin montras la jena anekdoto, kiu nun plezure rakontis Sro Gaston Bonnier.

La eminenta akademiano, iam, vojaĝis en Svedujo. Iutage, herbserĉante apud Stockholm, li ekvidis vojturniĝe « alian » naturiston, kiu, li ankaŭ, kolektis herbojn por sia herbaro. La viro estis sekvata de sia edzino rajdanta azeneton.

Ambaŭ botanikistoj rapide ekinterparolis. Kaj... alvenis la manĝohoro.

— Ĉu vi ne konus gastejon en la ĉirkaŭaĵo? demandis la estonta akademiano.

— Sed kial vi ne tagmanĝus ĉe mi, kun mia edzino? respondis lia kunulo.

historio estas certe interesa, kaj Dr^o Zamenhof mem preparolis ĝin en sia krestomatio.

Kiel nia Majstro, ni ne iros serĉi en la antikvan tempon la verkistojn tiajn, kiaj Sueton' kaj Aristot', kiuj en siaj verkoj jam antaŭvidis la grafologian arton. Ni nur diros, ke la unuan gravan traktaton pri tiu scienco, ni ja povas diri scienco, skribis en 1622 Italo Balbo. Lia libro ne tre famekonigis, tamen oni tradukis ĝin latinan; kaj dank' al Abato Michon, kiu ĝin malkovris en Montpellier en la jaro 1875, la verko de Balbo konigis. Ni devas ankoraŭ citi, kiel unu el la antaŭuloj, Leibnitz'on; li diris ke « la skribado ĉiam esprimas la naturan karakteron ». En 1792 Germano Grohmann konigis fiziologiajn pruvojn, por montri, ke la homa karaktero estas trovebla per la skribado. Goethe ellernis la libron de Grohmann, kaj skribis tre interesan leteron al la klerulo Lavater; tiu ĉi ankaŭ ekhavis la ideon ellabori la sciencan de l' skribado. Baldui, en la jaro 1806, li publikigis ĉapitron pri la estonta grafologio, kiu lia eldonisto, Moreau de la Sarthe, profesoro ĉe la medicina Fakultato en Parizo, plilongigis per propraj pripensoj, kiuj estis la unuaj firmaj fundamentoj de tiu arto.

Post kelkaj jaroj, en Anglujo, Stephen Collet eldonis verkon pri la ĉefaj karakteraj subskribaĵoj, kaj Edgar Poë ekfaris intuician (senrezonan) grafologion.

Sed precipe de la jaro 1830 la grafologio disvastiĝis en Francujo, en Germanujo kaj en Belgujo. En 1863 Germano, Henze, verkis libron enhavantan siajn pripensojn de maljuna grafologiisto. Post tri jaroj pentristo, J.-B. Delestre skribis fizionomian traktaton, en kiu estis ĉapitro pri la skribado.

Fine, ellerninte la devenon de la grafologio, ni alvenas al la epoko, kiam tiu arto, ĝis tiam embria, fariĝis tio, kio ĝi vere estas: scienco devenanta de la rezonado kaj de la eksperimentado. En la jaro 1872 aperis la plej grava libro el tiaj verkoj: « La misteroj de l' skribado » de Abato Michon, edukito de grafologiisto Flandrin. En multaj grafologiaj verkoj li kunigis ĉiujn disajn fundamentojn de la skribada scienco, kaj tiel fondis la grafologion tian, kia ĝi nun estas konata. S^r Crépeux-Jamin, la plej fama posteulo de Abato Michon, diris prave: « Balbo estas eble la patro de la grafologio, Lavater, Moreau, Flandrin, Henze kaj Delestre ĝiaj unuaj fondintoj, sed S^r Michon estas ĝia genio kaj plej glora elpensinto ».

De dek jaroj la grafologio vulgariĝas, kaj la gazetoj kaj revuoj enhavantaj grafologian rubrikon estas nekalkuleblaj. Eĉ ke kaj juĝistoj uzis tiun sciencan en malklaraj aferoj, kaj ĝi ĉiam sukcese servis ilin.

Oni komprenas la utilecon, koni sin mem kun siaj ecoj, kaj kiom da profito oni havas, juĝante siajn konatojn alimaniere ol laŭ ŝajne, ĉar la skribado malkaŝas la animan staton kaj ĉiujn ecojn, sekve la malvirtoj de la skribinto neniel povas esti maskitaj, kiam la grafologiisto estas sufiĉe sperta. En skribaĵo li vidas, kvazaŭ en senpartia spegulo, la animon, la spiriton, la karakteron de ĉiuj homoj, kaj « povi juĝi la homojn de malproksime, diris Alexandre Dumas (filo), kia reĝa povo! »

HENRI LAISNEY.
el Caen (Francujo).

Kaj Sro Bonnier akceptis.

Oni alvenis antaŭ la palaco de l' Sveduja reĝo; la nekonatulo haltis, malfermigis la pordojn, kaj petis eniri sian kunulon, dirante al li kun ĉarma afableco:

— Kion vi volas? Mi estas la reĝo de Svedujo; mi povas nenion je tio... mi ja devas vin gastigi tie ĉi...

Kaj dum la tuta tagmanĝo, la reĝo parolis nur pri botaniko, al la estonta akademiano.

Laŭ « Le Journal ».

La Dec. N^o de « Internacia Sciencia Revuo » enhavas la tabelon de enhavo por 1907. Tiu ĉi tabelo montras la intereson kaj la grandan variecon de la gazeto, kiu enhavis artikolojn pri pli ol 25 diversaj sciencoj. Tre notinde estas, ke la revuo donis la periodan enhavon de 67 diversnacaj kaj diversfakaj gazetoj. Tiel « Internacia Sciencia Revuo » iĝas la altvalora internacia informilo de ĉiufakaj sciencistoj, kaj ĝi montras la vojon sekvindan al la estontaj specialaj organoj, kiuj devas konigi al siaj legantoj tion, kio povas speciale interesi ilin.

Ĉar en la esperantistaj grupoj estas homoj interesataj al ĉiuj specoj sciencoj, ŝajnas ke « Internacia Sciencia Revuo » devas troviĝi en ĉiu grupa biblioteko.



LA ĈAMBRO DE L' PERISKOPO EN SUBMARA ŜIPO.

Submarveturado.

La 22^{an} de Novembro, du submaraj ŝipoj *Bonite* kaj *Souffleur* subakvigintaj interfrapis unu la alian. Nur dank' al la spiritĉeesto de ambaŭ komandantoj estis evitata terura malfeliĉego. La ĉi suba artikolo de nia distinginda samideano, Pro Marcel Finot, klarigas, kial la frapo povis okazi inter tiaj ŝipetoj, kvazaŭ blindaj tuj kiam ili malaperis por siaj specialaj manovroj.

Homo rigardadis ĉiam terurege tiun senliman mason da maro, movitan de subita kolero; sub la supraĵo blua aŭ verda, kiun vidas niaj okuloj, kiaj profundaĵoj misteraj sin kaŝas? Kia vivo ekzistas en tiu vasta submara mondo? Kion faras la ĵaluza maro, el tio, kion ĝi al ni ŝtelas, kaj kiel ĝian sekreton elŝiri? La Homo, kiu esploris la terojn, venkis la spacon, devis provi, enpenetri en la profundaĵojn de l' maro, kaj kontentigi sian nesatigeblan kuriozecon per vidado de tiuj nekonataĵoj.

Jam de longe oni estis provinta atingi tiun celon: oni certigas ke Aleksandro la Granda uzis maŝinon, dank' al kiu oni povis subakvigi: tio estas sendube la subakviga klotŝo, nome duonsfero returnita, en kiu restas sufiĉe da aero, por ke oni povu loĝi tie kelkatempe; ĝi celere multege pliboniĝis, kaj sennombraj estas ĝiaj aplikadoj por konstruadoj sub akvo. Sed oni volis pli bone fari, kaj konstrui ŝipon, per kiu oni povos veturadi sub maro. Dum la fino de l' 18^a centjaro, Fulton, eltrovinto de vaporŝipo, deziris helpi Napoleon'on por lia militado kontraŭ Anglujo, donacante al li ŝipojn kapablajn subakvigi; li estis helpata de Monge kaj Laplace, sed ne sukcesis venki la kontraŭbatalojn de siaj malamikoj. De tiu tempo, kelkaj serĉistoj mortis, eksperimentante siajn eltrovojn submarajn, sed oni povas certigi, ke nune la problemo estas preskaŭ solvita. La grandaj nacioj posedas ŝipojn submarajn, kies plej interesaj apartenas al Francujo, Anglujo, Ameriko. Malfeliĉe, la penadoj de serĉistoj celas nur

la militon, kaj oni povas nur citi alian ŝipon amerikan, *Argonaut*, por serĉi la perdaĵojn, kiujn sendas ĉiutage sur la fundon de l' maro la ŝippereoj; ĝi estas provizita per radoj, por veturi sur fundo, teniloj, kaj diversaj iloj por preni la eksterajn objektojn.

Trispecaj estas la submarŝipoj: 1^e) ordinaraj, 2^e) sendependaj, 3^e) surakvireblaj.

La ordinaraj estas ŝipoj konstruitaj precipe por submarveturado, kaj ne por veturado sur la supraĵo de akvo: oni provizas ilin per elektra motoro, kaj ili dependas de postenoj de ŝarĝo de elektra energio. La sendependaj, kontraŭe, estas provizitaj per vapor- aŭ petrol-motoroj, por veturadi sur supraĵo, kaj elektra aŭ kunpremita aera motoro, por veturadi sub akvo. La surakvireblaj aŭ pli ĝuste torpedŝipoj submaraj, havas duoblan ŝelon: unua, ekstera, malpeza, farita por bona veturado sur supraĵo; dua interna, tre forta, por kontraŭbatali la premon de akvo dum subakvigo. La interspaco inter la du ŝeloj konsistas el grandaj akvujoj komunikantaj kun ekstera akvo dum subakvigo, por ke la premo estu sama sur ambaŭ flankoj de la ŝelo ekstera. Kiam oni ilin malplenigas, la ŝipo resupreniras sufiĉe, por ke ĝi povu, veturadi sur supraĵo.

La konstruado estas sama kiel tiu de aliaj ŝipoj. La sekcio laŭlarĝa estas ordinare rondoforma, tial ke ĝi estas la plej taŭga por kontraŭbatali la premojn, kaj ĝi devas kontraŭ-

batali 70-100 metrojn da akvo, t. e. 7-10 atmosferoj, 7 por la francaj, 10 por la amerikaj laŭ la tipo *Holland*. La formo laŭlonga estas ŝpinila, la longeco estas tre ŝanĝebla, ĉar ĝi dependas de du kondiĉoj kontraŭaj: estas utile pligrandigi la longecon por la rapideco kaj l' ekvilibro, sed la longeco malpligrandigas la moveblecon. La rapideco ne estas tre granda; 18 kmj. sub, kaj 20 sur akvo.

Jen estas kelkaj sciigoj pri la lasta krosŝipo franca *Opale*: ĝi estas diametra je 4 metroj, longa je 47; tiuj ampleksoj ebligas perfektan firmecon, kaj 24 horojn da restado sendanĝera sub akvo; ĝia armilo, konsistanta el 6 torpedoj aŭtomobilaj, terurege povos efiki. Ĝia plej granda kvalito estas ĝia sendependeco, per uzo de du petrolmotoroj donantaj 600 HP. da forto, kaj 20 kmjn da rapideco supraĵe; tiu submarŝipo povos iri senpere de Cherbourg' Serbur' ĝis Alger' (Alĝe). La temperaturo ne varmiĝas pli ol 30° c.; fine ĝi povos enteni 21 homojn.

La submarŝipoj havas ian floseblecon pozitivan, 8 pro 100 ĉirkaŭe; por ebligi, ke ili subakviĝu rapide kaj sen granda laboro, oni penadas, ke ĝi estu nula, kaj oni igas ĝin negativa, metante la necesan kvanton da akvo en akvujojn. Tiuj ĉi estas kestoj el ferlado, kiujn oni laŭvole pleniĝas aŭ malpleniĝas; oni lokas ilin sur la fundon de la ŝipo; ili estas fortike konstruitaj kaj tute fermitaj, por kontraŭbatali la premon de aero kunpremita, kiu akvon forpelas, por malpezigi la ŝipon; ili konsistas el multaj fakoj por pli granda fortikeco.

La diversaj partoj de submarŝipoj interrilatas per muretoj, en kiuj oni faras pordojn komplete fermeblajn per kaŭĉuko. Oni eniras en ĝi per truo ŝtopebla per fera deko, kiun oni povas rapide kaj facile fermi.

La posteno antaŭa de la ŝipo, posteno de la komandanto, estas provizita per vitraĵoj dikaj, kaj tie oni lokas la ilojn, manometrojn, kompasojn, k. t. p., por sin direkti tra horizontalaĵ kaj vertikalaĵ planoj; tie ankaŭ estas finiĝo de *periskopo* (ĉirkaŭvidilo), kie rebrilas la bildo de l' objektoj kuŝantaj sur la supraĵo, dum la finiĝo supera de l' ilo estas ekster akvo.

La vidado estas parto de l' problemo de la submarveturado pleje malfacile solvebla; ĝi ŝajnas eĉ nesolvebla, ĉar post kelkaj metroj da profundeco, komandanto ne plu povas vidi, per la antaŭaj vitraĵoj, la malantaŭan parton de sia ŝipo, kiu estas proksima nur je 10 metroj. La malgranda radio de videbleco de la ŝipo sufiĉas por laboroj de esplorŝipo kiel *Argonaut*, sed ne por celo nur milita. Oni do provis korekti tiun difekton per periskopo; sed tiu metala tubo estas alta nur je 3 metroj, kaj, kiam ŝipo malsupreniras, la periskopo subakviĝas, kaj blindiĝas la ŝipo. Kiam submarŝipo volas ataki ian ŝipon, ĝi observas ĝian vojon per periskopo iom elirinta, rapide; poste ĝi subakviĝas kaj blinde marŝas antaŭen, gvidata nur per la vojo kaj kompasoj. Ĝi direktas sin sur plano horizontala per vertikalaĵ direktiloj, kiel ordinaraj ŝipoj, kaj vertikale per horizontalaĵ; agante konvene sur tiuj iloj, oni povas laŭvole direkti la ŝipon.

La loĝebleco de tiuj ŝipoj estas kiel eble bona; ili havas sufiĉe da pura aero por longatempe restadi sub akvo; kaj kunpremita aero, uzota por sendo de torpedoj kaj forpelo de akvo, ebligas, ke oni plidaŭrigu la subakviĝon. La sendanĝereco estas efektiva nur per masoj el plumbaj, kaj ujn oni povas facile forpeli.

Tial do la submarŝipoj estas precizaj iloj tre delikataj, nur

kondukeblaj de oficiroj, kiuj multe studis tiun specialan fakon de marveturado, kaj kiuj komandas ŝipistaron instruitan. La ŝipo, malrapida, blinda, kiam ĝi veturas sub akvo, kaj armita nur per torpedoj, ilo fortega de detruado, utilas nune por defendo de bordoj. Oni ofte opinias, ke oni povas konduki ĝin tiel facile, kiel kiam ajn ŝipon; tio estas grava eraro, kiu povas kaŭzi novajn malfeliĉojn; oni devas konfesi, ke ĝi apartenas ankoraŭ pli al fako scienca, ol al fako milita.

Ĉu oni povas pripensi pri maraj militoj, dum kiuj la submarŝipoj oni povos uzi? Sufiĉas ke, dum senmova maro, dum ĉielo trankvila, ŝipo renkontas ŝtonegon, kaŝitan sub akvo, por ke tute ĝi pereu, por ke tiu flosanta fortikaĵo, kun siaj kanonoj kaj sia ŝtala ĉirkaŭaĵo, malaperu por ĉiam! Sed submarŝipo estas ŝtonego translokiĝanta, rifo marŝanta, kiu spionas sian kaptaĵon, kuras apud ĝin! Malgraŭ ĉiuj manovroj, singardoj, sistemoj de defendoj, ĉiunmome ŝipistaro devas timi atakon, kiun ĝi povas nek antaŭvidi, nek repuŝi. Kion fari efektive kontraŭ tio? Estas preskaŭ neeble ĝin atingi, kaj tute neeble ĝin persekuti. Oni ne povas ja kontraŭsendi submarŝipon al alia submarŝipo: tiuj ŝipoj ne povus, sub akvo, reciproke sin serĉi aŭ ekvidi. Oni ilin ne vidas, ne aŭdas, ili evitas torpedojn. Oni nur havas unu ŝancon, por ilin eviti: ili marŝas malrapide, oni povas forkuri.

Dum la unua konferenco de La Haye, propono estis farata, por ke la uzo de torpedaj submarŝipoj estu malpermesita: oni devas deziri, ke tio estu iam akceptita; tial oni povus plibonigi la ŝipojn, ne por milito, sed por pli bona celo: tiu veturadmaniero povos esti treege taŭga por esplorado de submaraj regionoj, kaj tial progresoj de la scienco plenumos aferon ne de morto, sed de venko paca, nova etendo de l' fortoj de l' homo inteligenta sur la fortoj brutaj de la naturo.

Malgraŭ ĉiuj antaŭzorgoj, kiujn oni povas preni, estas tamen malgaje konstati, ke tiuj ŝipoj estas danĝeraj, kaj ke la plej malgranda nezorgo povas kaŭzi teruregajn malfeliĉojn. Oni memoras ankoraŭ la perein de la franca *Farfadet*, la 6^{an} de julio 1903. La komandanto ĵus komandis la manovron de subakviĝo, kiam subite la submarŝipo oscilas, kliniĝas kaj glutatiĝas: oni supozas, ke la supera klapo ne estis tute fermita, kaj akvo eniĝis rapide en la ŝipon, kie ĝi asiksiis 6 maristojn; en alia parto fermita de la ŝipo, kie loĝis ankoraŭ 8 homoj, la kvanto da aero provizita estis sufiĉa nur por 10 horoj, kaj oni povas imagi la teruran agonion de tiuj malfeliĉuloj, kiuj tamen povis vivi 32 horojn! Oni scias, ke oni faris ĉion eblan, por savi tiujn maristojn; nur post 74 horoj oni sukcesis, meti sub la ŝipon kvar fortegajn katenojn, oni sublevis ĝin, kaj post ok tagoj, el la ŝipo fortirita ĝis l' armilaro, oni eliris la malvivulojn.

Ĉu oni ne povus eviti tian malfeliĉon? Oni diris rajte, ke fortikaj ringoj, fiksataj al la ŝelo, ebligus, ke oni sublevu pli facile perdaĵon per katenoj kun hokoj. S^{ro} L. de Saussure indikis rimedon, por malhelpi danĝeron de asiksio: sufiĉas, ke oni provizu la submarŝipojn per tubetoj interne fermitaj, sur kiujn oni povus ŝraŭbi tubojn ĝis aero ekstera, per kiuj oni sendus aeron puran al la maristoj, per maŝinoj je aero kunpremita.

Sed kiaj ajn estu tiuj antaŭzorgoj, oni devas memori, ke malfeliĉoj estas neeviteblaj, kaj ke ĉiu nova eltrovo devas pagi sian ŝuldon al la morto.

MARCEL FINOT.

SUB MARO, SUR TERO, EN L' AERO.

Jen la rakonto farita de unu el la ŝipanoj de *Souffleur*, post la okazintaĵo ĉi supre aludita:

« Momente, mi kredis, ke ĝi estas la fino. La frapo estis estinta tre subita, akompanata de ekstera bruigo, poste ni aŭdis la akvon rapidenflui en la kioskon, sed neniu el ni timŝanceliĝis. Cetera la komandanto ordonis liberigi la plumbojn. Li parolis kun voĉo neta kaj klara, kaj komandis kun tia memsinposedo (malvarma sango), ke oni povis, sin kredi eĉ simpla ekzercero.

L' eskadro, kiu dume preterpasis reirante Toulon'on, ne havis ian ideon pri la katastrofo preskaŭ okazinta ».

Jen, aliparte, karakterizaj eltiraĵoj de ĝenerala ordono de ĝeneralo Drude, post la batalo de l' 19^a de Oktobro en Maroko, kies tuto estas simila al la eltiraĵoj:

« Estas citataj en la ordono de l' e' ŝipiga korpuso:

2^e S^{ro} Maleval ĉevalkuracisto eĉ la 1^a Afrikaj rajdĉasistoj. (Vidante fali la skadronan kapitanon mortvunditan, sublevis lian korpon kaj, unumane ĝin subtenante, ĝin defendis revol-

verpafe kontraŭ kelke da Marokanoj, kiuj celis ĝin forpreni, por ĝin senkapigi.)

3^e S^{ro} de Revel, leŭtenanto eĉ la 1^a Afrikaj rajdĉasistoj. (Rapidegis al la korpo de rajdisto ĵus mortigita, kaj ĝin defendis sabrobate kontraŭ grupo da Marokanoj, kiuj volis ĝin kapti.)

4^e Bourcheix, ĉefrajdservanto; Valatte, rajdkaporalo; Bèze, rajdĉasisto. (Rapidegis por helpi oficieron ĉirkaŭita de multe da Marokanoj, kiuj volis, de li forpreni la korpon de rajdĉasisto morte frapita, kaj, post tre viva militago, lin fordanĝerigis).

Fine dum du tagoj, la 29^{an} kaj 30^{an} de Nov., oficiroj kaj soldatoj batalis kontraŭ perforta vento, por savi la direkteblan aerostaton *Patrie*. Leŭtenanto kaj adjudanto suriris, vivriske, en la aerveturilon, penante atingi la ŝirŝnuron.

Tiel la tri elementoj, en kiuj Homo ekzercas sian detrueman agemecon, estas egala honorkampoj por oficiroj kaj soldatoj instigitaj de samaj deva sento, kaj patruja amo, obeatigaj al disciplino pli kaj pli bazita sur reciprokaĵo kaj amemo.

A. C.



REĜO EDUARDO EN SKOTA KOSTUMO POR LA ĈASO.

Eduardo, Reĝo de Britujo.

En Britujo, nia Reĝo estas « Bonegulo », kaj havas por si mem bonan tempon, kaj deziras por siaj regatoj ankaŭ bonan tempon. Oni ofte aŭdas, ke nur la Franco scias ĝojiĝi, kaj tre ofte tio estas vera. Mi timas, ke ni Britoj « prenas niajn plezurojn malĝoje »! Eble tio estas, ĉar ni ĝenerale havas pli malvarman, malluman veteron. Estas certe, ke la vetero havas grandan influon sur nian energion. Se la vetero estas brila, ni estas gajaj, kaj se la vetero estas malluma, ni estas malgajaj kaj malĝojaj. Tial, en la « suna sudo de Francujo », la homoj estas ĝojaj kaj vivecaj, ĉar la vetero estas luma, kaj varma, kaj brila. Tamen, por ĉiu regulo estas esceptoj, kaj, eĉ inter la malĝojaj Britoj, ni ofte trovas homojn, kiuj posedas bonajn, varmajn korojn, kaj estas (por mallonge paroli) optimistoj. Kaj inter tiuj malmultaj ni trovas nian bonan Reĝon. Nia Reĝo Eduardo estas bonkora kaj bonhumora. Li deziras, ke li povu kompreni ĉiujn homojn; li deziras, ke ĉiuj homoj komprenu lin; li deziras pacon inter la nacioj, kaj fratecon inter ĉiuj ajn. La Reĝo iras ĉien, li alfaras sin al la kutimoj de la lokoj, en kiuj li sin trovas, kaj li sekvas la proverbon — « Kiam en Romo, faru kiel la Romanoj ».

Ĉiusemre lia Reĝa Moŝto venas Skotlandon, por tie pasigi mallongan tempon, dum la ĉasa sezono. En la supra pentraĵo li vidiĝas kiltevestita, (1) ĉar tio estas la Skota nacia kostumo, kaj li ĝuas tutajn tagojn sur la montetoj, inter la longa, purpura eriko, kun siaj hundoj kaj sia pafilo, tute tiom, kiom li

ĝuas ie. Ho! estas ĝojiga kaj rava por la Reĝo, kiu aliloke estas ĉirkaŭata de lukso kaj artefareco, kaj neniam povas sin senti natura, ke jam li sin trovas « malproksima de la freneziga amaso », en la granda soleco de naturo, kie la homo povas paroli kun Dio, kaj sia propra koro; kaj kie la artefarita mondo ŝajnas iĝi tre malgranda kompare kun la glora mondo, kiun Dio faris. Nia Reĝo estas *unu* homo, poste Reĝo. Mi pensas, ke li ofte laciĝas, pro la multaj aferoj, kiujn reĝo devas atenti. Kaj ke ofte nia Reĝo Eduardo deziras, esti nur homo, nur ordinara homo.

Mi aŭdis, ke la Reĝino de Hispanujo neniam estas sola. Ŝi neniam havas por si mem unu momenton. Se ŝi ne faras aferojn pri la Ŝtato, ŝiaj religiaj instruistoj estas kun ŝi, por vidi, ke ŝi ne forgesu siajn sanktajn devojn. Nu, mi pensas, ke ĉiu deziras iam, esti sola, eĉ reĝoj kaj reĝinoj. Ankaŭ naskiĝis en ĉiu homo la deziro, agi kiel oni volas mem, ne tiel, kiel aliaj deziras por li. La okuloj de la tuta mondo estas fiksitaj sur la reĝoj kaj reĝinoj, kaj tial ili ne povas fari tion, kion ili dezirus. Pro tiu kaŭzo, mi pensas, ke nia Reĝo, kiam li estas lasinta Londonon post si, ankaŭ ofte lasis multajn zorgojn, kaj ke, en la altlando de Skotlando, li trovas sin pli juna po multe da jaroj, kaj pli feliĉa. Vivu nia bona, pacema Reĝo Eduardo!

DE AGNES BROWN MACKENZIE.

Edinburgo, Skotlando.

(1) « Killo », Skota kostumo.

El kuraceja vivado.

Wiesbaden, 5^a de Majo 1906.

TRE KARA AMIKINO,

Vi jam eble atendas leteron de mi kun Wiesbaden'aj impresoj... ili ne estas multaj, ĉar mi ne venis por impresoj. Wiesbadeno plaĉas al mi, ĉar ĝi, mi esperas, resanigos mian patrinon, kaj al mi — ne malfaciligos la studadon. Nenion plu mi deziras. Kaj plie, la kuracejo estas vere bela: ĝiaj larĝaj vivecaj stratoj, blankaj villoj ridetantaj inter bukedoj da ruĝaj floroj, la teatroj, koncertoj, sportejoj, ĉio faras impreson gajan kaj festan.

Kaj la ombroplenaj, misteraj ĝardenoj!...

Mi jam trovis en ĝi favoran por studadi, izolitan lokon, kien nur venas birdaraj krietoj, kaj ploro de kaskado. Ha! kiel mi laboros!... Jen, kara, miaj impresoj. Sed... tamen, mi havis ankoraŭ unun, kaj — neprograman. Mi vidis unu viron, kiu, inter la multaj elegantuloj de kuracejo, altiris mian atenton. Li estas pli ol mezaĝa, en tiu epoko, kiam la suno viveca de l' viro komencas paliĝi. Oni ne povas lin nomi bela, oni eĉ povas diri malbela kaj — ne-moderna. Lia forta, majesta figuro rememorigas pri la bronzaj statuoj de reĝoj aŭ batalistoj, viditaj en germanaj urboj — lia kresko estas tre alta, liaj moviĝoj trankvilaj, nerapidaj. La larĝan vizaĝon ĉirkaŭas densaj, falantaj sur brusto blondruĝaj vangharoj, la okuloj tra oraj okulvitroj rigardas maltime kaj iom — malvarme. Li portas ĉiam grizan vestaĵon, kaj kiam li subite alturnas sian vizaĝon kun oraj vangharoj — li faras la strangan impreson, kvazaŭ lia kapo estus en lumoj, kvazaŭ la foriranta suno ĵetus sur lian vizaĝon siajn ruĝajn rebrilojn...

Mi lin renkontis kelkajn fojojn. Ĉiam sola. Li staris aŭ promenadis. Kia li estas — mi ne scias; sed kiam mi vidas lian belforman, majestan — kvazaŭ skulptitan figuron, mi pensas senvole, ke tiu viro certe nur konas siajn volojn — ili estas leĝoj por ĉiuj, kaj por ilin plenumi, ne ekzistas baroj.

18^a de Majo 1906.

Kiel mi lacigita! Kia suno, kia varmeĝo! Oni ne povas spiri! Li havas ian strangan manieron, li subite montriĝas — kaj malaperas. Kaj tiel ĉiam. Kiel hodiaŭ: Estis taga koncerto, la placo pleniĝis de muzikemaj kuraculoj, li alvenis subite, haltis momenton antaŭ la muzikpaviliono, kaj poste, forpasante ĉiujn bankvicojn, eniris ĝardenon. Tra la freŝa verdaĵo makulita de lumoj aperadis lia griza vestaĵo, brilis en suno la ruĝaj vangharoj... kaj malaperis. Kial li venis? Aŭdi muzikon? Tro malproksime! Por promeni? En plej malvastplaca loko! Do kial? Kaj tion incitas miajn nervojn... mi ne scias, kion mi havas, mi estas ja stranga, ekscitita. Miaj tagoj forpasas kiel en febro. Je la pala mateno mi vekigis — tre laca, sed mi ne povas dormi; vekas min ja deziro — ĉu espero! mi ne scias; — kaj min ne forlasas dum la tuta tago. Mi ne povas trovi trankvilan lokon. Mi tutatage estas en moviĝo: de l' loĝejo al ĝardeno, al legejo, fonto, tra la brulanta varmeĝo — kiel frenezulineto. Tiu deziro — aŭ

espero — min puŝas, turmentas, incitas. Kion mi serĉas, kion mi esperas? Ha! kion mi esperas... Mi pri nenio pensas, pri nenio interesigas, ne; — mi ne estas kapabla ion fari — Unu, nur unu, sento — aŭ fantazio — okupas min tutan, kaj en mi restas obstina, konstanta, neforigebla! Miaj laboroj... Ha! se ili estus la savo de mia animo, mi farus nenion! Mi ne povas, ne povas... Kaj ankoraŭ la kuracado! trinko de akvo... banoj... kaj tiu fajro en la aero — tiu stranga fajro en mi... Ha! kiel mi estas laca, ekscitita, malfeliĉa.

Kaj vespere — post tiu febra tago, kiam mi revenas domon, tra longaj, malplenaj, lumigitaj aleoj — kiam mi revenas kaj pensas, ke jen finiĝis unu tago, kaj ĝi estis tiel terure malplena, kaj al mi nenion alportis, nenion donis, kaj nun mi devas kuŝiĝi... dormi — prenas min tia enuo, ke mi volas jen sur la straton min ĵeti, kaj krei, jen kaŝi mian vizaĝon per miaj manoj kaj plori mallaŭte — kiel infano.

Kaj nokte — el la fenestro venas printempaj blovetoj, la luno fantazie arĝentas la kurtenon — kaj mi revas pri longaj longaj, nefiniĝantaj konversacioj — sen vortoj, interparoladoj el rigardoj kaj silento, el reciproka enpenetrado en la animojn kun la pasinto...

27^a de Majo.

Ĉu vi scias, kio estas unu el malĝojaj finoj de ĉiu projekto? — Ĝia nerealiĝo. Jes, ĉiu revo aŭ deziro homa, kiu naskiĝis, kaj, de neniu konata, silente mortas en la koro — havas neesprimeblan malĝajecon: estas en ĝi drameco de silento kaj senfina malankolio de floroj fojniĝantaj en burĝonoj...

Ĝi estis d manĉo, kun sia tuta enuo de festa tago. Post longa, varmega, laciganta tago alvenis ridetanta vespero. Ĉio dolĉiĝis: la akraj sunaj makuloj dissemiĝis sur la ĝardeno ŝanĝiĝis en longaj, rozaj lumoj, kiuj delikate kuŝiĝis sur la gazonojn kaj tremis sur la floroj kaj folioj... Ŝajnis, ke la suno, sur ĝin premeginte sian helan buŝon, kovras de longaj kisoj la tutan senmovan teron — en la mistera, solena momento de sia adiaŭo al ĝi...

Je la fontejo amasiĝis la kuraculo. Mi iris tra tiu bruanta, multkolora amaso, kaj subite mi sentis tiel precize, kvazaŭ iu dirus al mi, ke mia stranga fantazio jam ne povas vivi, ke tiu maja vespero estas la momento de ĝia morto — ke ĝi foriras kun la suno. Ĝi foriras sub ordono de l' fiereco, ĵetante al mi plendan, demandan rigardon — sed mi tiel konsciis la devecon de tio, kio okazas, ke mi restis senmova, ne provante ĝin haltigi, sendefenda, silenta. En mia koro laŭtiĝis nenia voĉo de malkonsento aŭ bedaŭro, nenio... nur mi sentis malfermiĝi subite en ĝi stranga, terura malpleneco...

La lastaj lumoj estingiĝis sur la gazonoj — ĉio malheliĝis kvazaŭ pro malĝajeco. La kuraculoj disiris...; nur en la malluma aero ploris inter floroj la blankaj kaskadoj...

Mi baldaŭ forveturos el Wiesbadeno. Kial tiu nekonata voĉo prenis tiom da pensoj, tiom da sentoj el mi? — Ĉu li eĉ scias ion pri tio?...

Simo HULANICKA,
(Polujo).

BIBLIOGRAFIO.

« *Unua legolibro* », de Dr^o Kabe (M. 1,50 — 0,72 sm.) ĉe « Germana Esperantisto ». Tiu volumo konsistas el gradigitaj legaĵoj kun frazilibro kaj modeloj de leteroj. Ĝi estos bonega por la komencantoj, kaj ankaŭ por tiuj, kiuj jam multe legis, ĉar ĝi enhavas interesajn rakontojn kaj fragmentojn.

« *La Faraono* », dua volumo, de la sama (2 fr. — 0,80 sm.) ĉe Hachette K. Kio. Tre rimarkinda volumo. Ni atendas senpacience la aliajn.

« *Vivo de Jesuo* », de Ernest Renan, esperantigita de Emilo Gasse (Francuje 2 fr. 75; alilande 2 fr. 90 — 1,15 sm.) ĉe la ĉefaj Esperantaj eldonejoj kaj ĉe la aŭtoro (Vidu la kovrilon). Jen la plej grava el la verkoj modernaj ĝis nun presitaj en Esperanto, pro la fameco de la originala verko kaj de ĝia aŭtoro. En Francujo, ĝi estas jam presita po 78 miloj, kio estas grandega nombro, precipe por filozofia-historia verko; kaj en multaj lingvoj ĝi estas ankaŭ tre disvastiĝinta. Sed por aliaj lingvoj, por homoj, kiuj ne konante nek la francan, nek ilin, dezirus tamen legi « *Vivo de Jesuo* », la traduko de Sr^o Emilo Gasse estas pleje altvalora; por la aliaj esperantistoj ankaŭ cetere, kies multaj ne legis tiun faman verkon en sia gepatra lingvo. Eĉ por tiuj, kiuj jam ĝin legis nacilingve, la legado en Esperanto estos fonto de plezuro spirita, kaj ankaŭ esperantista, pro la korekta stilo de la aŭtoro, « esperantisto de la unua horo ».

Ni ne intencas analizi tie ĉi verkon, kiu estis la objekto de tiom da diskutoj, kaj kies titolo parolas sufiĉe klare. Mi opinias pli interese, doni kelkajn eltraĵojn el la « *Averto de la eldono franca* », en kiuj Ernest Renan klarigis la celon, kiun li deziris trafi, kaj la rezultatojn, kiujn li, espereble, atingis, maldikigante la originalan eldonon por fari *popolan* eldonon.

« ... Unue la libro fariĝis je formato tiel modesta, ke ĉiu persono, al kiu ĝi plaĉos, povos ĝin posedi. Due mi ne kredas, ke en ĝi restas unu vorto, nek unu frazo postulanta, por esti komprenata, lernejojn antaŭajn. Fine per tiuj fortranĉoj mi ricevis rezultaton, kiu ne estas al mi malpli multvalora. Mi estis faranta mian libron kun la malvarmeo absoluta de historiskribisto, kiu celas nuran objekton; ekvidi la nuancon plej delikatan kaj plej ĝustan de l' vero. Ĉi tiu malkaŝaĵo mi povis manki kaŭzi kelkajn ofendetojn al tiom da animoj bonegaj, kiujn kristismo altigas kaj nutras. Pli ol unu fojon, mi bedaŭris vidante personojn, al kiuj mi senlime ŝatus plaĉi, deturmitajn de la lego de libro, en kiu kelkaj paĝoj eble ne estus por ili sen agrableco nek sen frukto. Mi kredas, ke multe da veraj kristanoj trovas en ĉi tiu libreto nenion ofendantan ilin. Sangante nenion ajn de mia penso, mi prosperis forigi ĉiujn lokojn, kiuj estus eble kaŭzontaj malkomprenigojn, aŭ kiuj postulus longajn klarigojn.

Ĉi tio do ne estas nova libro. Ĝi estas la « *Vivo de Jesuo* », liberigita de siaj trabaĵoj kaj de siaj mallumaĵoj. Por esti historiskribanto, mi devigite penis serĉi pentri unu Kriston, kiu havas la trajtojn, la koloron, la fizionomion de sia raso. Ĉi tiun fojon, mi prezentas al publiko unu Kriston blankmarmoran, unu Kriston simplan kaj puran kiel la sento kiu lin kreis. Dio mia! eble li estas tiel pli vera. Kiu scias ĉu ne estas momentoj, en kiuj ĉio elĝanta el la homo estas senmakula? Tiuj momentoj ne estas daŭraj; sed da ili estas. *Tiel*, almenaŭ Jesuo aperis al la popolo; *tiel* la popolo lin vidis kaj lin amis; *tiel* li restis en la koro de l' homoj. Jen tio, kio vivis en li, tio, kio ĉarmis la mondon kaj kreis lian senmortecon. »

La verko estas presita sen supersignoj, tute ne pro « ia reforma manio » diras la tradukinto en sia averto, sed pro diversaj kaŭzoj nevolaj. Tia presado estas farita en konformo kun la jena teksto: « Presejoj, kiuj ne posedas la literojn c, g, h, j, s, u, supersignajn, povas, anstataŭ ili, uzi ch, gh, hh, jh, sh, u. ». Fundamenta krestomatiko, p. 254. Plie, ĝi estis speciale permesata de Dr^o Zamenhof mem.

La intereso de tiu verko, traduko laŭ unu el la ĉefaj verkoj de l' universala homa penso dum la 19^a jarcento, tiu de « *La Faraono* », por aludi nur du el la tute lastaj verkoj, pravas, unufoje pli, la flekseblecon de nia lingvo, ĝian riĉecon da formoj, ĝian espriman potencon. Ni gardu ĝin ĵaluze, ne portante al ĝi krimecan manon.

Kelkaj broŝuroj agrablaj, utiligeblaj por la kursoj aperis:

En la « *Esperantista universala biblioteko* » eldonata de Sr^o A. Marich: *Hungara Poemaro*, II (Petöfi kajero) (30 helerojn, ĉe « *La Verda Standardo* »). Ĝi enhavas 5 poemojn kaj karakterizajn naciajn kantojn, tradukitajn de Dr^o R. Fiedler kaj A. de Marich, R. Rajczy. La 3^{an} kajeron ni ne povas juĝi ĉar ni ne ĝin ricevis.

« *Kelkaj floroj Esperantaj* », de Sr^o A. Witteryck, 5^a n^o (25 c. 10 sd.) 4, Nouvelle Promenade, Bruges, Belgique, ĉiam gajeplena kaj amuzanta.

La volumo estas dediĉita al nia talenta amiko A. Van der Biest, kies verkon ni enpresas hodiaŭ, kaj enhavas lian portreton.

« *Per telefono* » tre ĉarma Sceneto de Jacques Freneuze. Estas, mi kredas, la unua monologo por junulino. Tre bone tradukita de nia delikata muzikverkistino Sr^o José Guivy (15 c., 6 sd., ĉe « *Espero Katolika* »). Sama eldono: « *Katolikaj kunvenoj dum la tria kongreso* » 25 c., tre interesa kun la predikoj dum la diservoj. « *Patronia* », kvarvoĉa horo kantita dum tiuj diservoj, teksto kaj kompono de Johano Gothardo, el Vieno.

« *Ranratbatalo* » herokomika verko, de posthomera poeto, tradukita de malnova, favore konata samideano, E. Deligny. La titolo sufiĉas por montri la gajan karakteron de la verketo (40 c., 16 sd., ĉe « *Lingvo Internacia* »).

« *La Pariziano* », resumeto de la vivo kaj manieroj de la Francoj kun specialaj rimarkoj rilate al Parizo, de R. Kron. Ph. D., tradukita de J. C. O'Connor, M. A., kaj C. F. Hayes (1 ŝil. ĉe « *British Esperantist* »).

Koran dankon al nia distinginda samideano Dr^o Ambrosio Vargas, pro sendo de lia interesa « *Conferencia sobre el Idioma Internacional « Esperanto* ».

« *Finna Esperantisto* » aperas tippresita, korajn bondezirojn. Nia kunfrato « *Belga Sonorilo* » donas longajn sciigojn pri la Delegacio pri la elekto de internacia lingvo. En la tri lastaj numeroj ni trovis, inter ĝojgaj sciigoj pri la propagando en Belgolando, la jenajn interesajn esperantaĵojn: Forĝisteto, de F. V., unuigo de la geografiaj koordinatoj, de L^o Cardinal; Kristino pretigu la liton! (terura rakonto), de nia malnova samideano A. Kofman el Odessa, kiom meditinda por tiuj, kiuj projektas fondi gazetojn esperantistajn; Pri la Sankta Nikola festo, de Max Horowitz, k. a.

Al niaj kunlaborantoj aŭ kunlaborontoj.

Oni ofte sendas al ni artikolojn pri aferoj tro lokaj aŭ pri famuloj tro unulandaj. Oni bonvolu kompreni, ke internacia gazeto devas doni al siaj legantoj nutraĵon internacian.

Ni rekomendas ankaŭ la legadon de « *Ekzercaro* », de Dr^o Zamenhof. Tiu libro devas esti la konstanta konsilanto de tiu, kiu deziras verki en Esperanto.

Bonega eldono de tiu verko estas la nova « *Konkordanco de la vortoj de Ekzercaro* », de nia klera angla samideano Alfred E. Wackrill (1 fr. ĉe Hachette K. Kio).

Per tiu verko, la aŭtoro celis faciligi la serĉadon de la vera, ĝusta senco de la vortoj troveblaj en la « *Ekzercaro* ». Tiucelen, li komencis numerante ĉiujn frazojn de la diversaj ekzercoj de la « *Ekzercaro* »; poste li ordigis ĉiujn radikvortojn, afiksojn enkondukitajn en la diritan ekzercaron, aldonante la frazojn (kun la ekzercakaj frazaj numeroj) en kiuj troviĝas tiuj vortoj.

Tiu volumeto estas vere rekomendinda al ĉiuj, kiuj deziras akiri la veran Zamenhofan lingvon, kaj ni multe rekomendas ĝin al niaj afablaj kunlaborantoj.

KRONIKO.

Edukistaro. — Pli kaj pli Esperanto penetras en ĝin: Sr^o Durieux, direktoro de la lernejo Montesquieu, en Lille (Francujo), atingis rimarkindajn rezultatojn per prudenta kaj lerta agado. Li sukcesis tute esperantistigi Sr^o Minet, inspektoron de unuagradaj lernejoj, dank' al kiu la instruado de Esperanto en la knabaj kaj knabinaj superaj lernejoj estas oficiale organizita. De nun, skribas al ni Sr^o Durieux, 1100 gelnantojn en Lille lernas Esperanton. Plie, *prefera promocio* estos donata al instruistoj sciantaj la lingvon.

Sr^o Cocq, skabeno (urba magistrato) de l' publika instruado en Iksele, antaŭurbo de Bruselo (Belgujo) persone altiras la atenton de la instruistaro al Esperanto, ĝin instigante ĉeesti urban kurson.

En Burgos (Hispanujo), simila agado. Post bela parolado de Sr^o Ignacio Casas, kursoj estas malfermitaj en la Normala Lernejo, por instruistinoj kaj por la abiturientaj lernantoj.

Estas dezirinde, ke metoda propagando ĉie okazu. Ni rekomendas la legadon de tre interesa raporto de Sr^o Durieux, presita en « *L'Espérantiste* » n^o 9 (114). Ĝi certe utilos al multaj propagandistoj.

A. MONTROSIER kaj STELETO.

Sroj W. Page, Staff Surgeon J. C. G. Reed, Finot, Van Weyenbergh, Randall, H. H. Hart; Fino Brown, korajn dankojn pro viaj afablaj sendaĵoj.

Sr^o J. Pion. Jes sendu la artikolon.

Sr^o M. David. Mi ricevis l' aldonon. Via artikolo baldaŭ aperos.

Sr^o F. Skog. Jes sendu la artikolon. Aglino baldaŭ elflugos!

Sully Prudhomme

Rilate malmulte konata de l' homamaso, Sully Prudhomme estis satata kaj amata de la delikatuloj kaj kleruloj. Tial ni ricevis du

Mi konas neniun poeton, al kiu oni proksimiĝas kun pli multe da simpatio konfidema, ol Sully Prudhomme.

Junuloj, kiuj amas, iru al li: li diros al vi la pasion delikatan kaj sinceran. Se via pasio estas rompita, vi ĉerpos el li la donacon de la ploroj veraj, senfanfaronaj kaj senmaldolĉaj. Iru al li, vi, kiuj portas, maljuniĝintaj, la pezon maltrankviligan de la pensado: li instruos al vi la noblan konkludon de sia revo, de sia dubo, de sia propra doloro: serĉi la sencon de la vivo en la *justeco*, kiu, per la harmonio, kiun ĝi fondas, kondukas al la *feliĉo*.

« Mi naskiĝis (1) en tia familio, Sully Prudhomme skribas mem, « kies kelkaj membroj estis rimarkinde naturfavoritaj por la pen-trarto, sed neniuj el ĝi distingiĝis en la literaturo. Mia patro, tamen, « elegante skribis, kaj verkis bone la versojn. Mia patrino estis tre « revema, nezorgema pri la praktikaj utiloj de la vivo. Jen estas ĉiuj « elementoj iom poeziaj, kiujn mi trovis en mia ĉirkaŭlaro ».

Unue, ja, la junulo ne kredis, ke li havas literaturan emon. La unuaj inklinoj tre vivaj, kiujn li elmontris estis sciencaj. Li sin preparis por la *Lernejo politeknika*, forlasis ĝin por eniri en la fabrikejojn de *Le Creusot* (2) kiel oficisto; forlasis *Le Creusot* por sekvi la kursojn de la *Lernejo de Lejoscienco* kaj iĝis... oficisto ĉe notario. Sed li ŝatis tiun profesion ne pli ol la antaŭajn, kaj li baldaŭ forlasis ankoraŭ ĝin, por sin dediĉi definitive al la filozofio kaj la poezio.

Peliĉa artisto, li havis libertempojn, kaj uzis ilin por viziti senrapide kaj serioze la muzeojn de Amsterdamo, Parizo, Firenzo, kaj Romo, kreskigante tiel, kaj fiksante, sian inklinon por la formoj puraj kaj belaj.

Liaj impresoj, cetere, estas malpli vivaj ol profundaj; li estas malpli sentema por la ekstera apero de la aĵoj, ol por ilia intima senco: lia vido iĝas penso.

Je tiu epoko, li vizitadas ĉe *Leconte de Lisle*, kaj li konfesos poste l' influon certan, kiun la fama « *parnassien* » havis sur sian junan admiranton.

« Aŭdante la belajn poemojn, kiuj estis legataj en tiuj kunvenoj, mi ekkomprenis, ke la beleco de la verso estas ne disigebla de ĝiaj formaj kvalitoj ».

Por ricevi de la plej forta kaj preciza el la poetoj la sekretojn, « por submeti la versojn al la ideo » (tio estas la paroloj mem de l' aŭtoro), Sully Prudhomme studadis atente la poemon de *Lucrèce*, kaj tradukis verse la unuan kanton — traduko pli estiminda pro la precizeco laŭlitera, ol pro la poeziaj ecoj.

Sed jam lia unua kolekto da versoj (1865) estis montrinta lin al la literaturistaro: « *Strofoj kaj poemoj* », ama libro, la libro de lia dudeka jaro, kiu montras de nun filozofiajn inklinojn. Ĉion mi deziris ami », ekkrias la juna poeto. Li ekkaptis la ligilojn misterajn, kiuj unuigas ĉiujn estaĵojn; kaj jen li surĵetas sur la tuta naturo la fervorojn, kiujn li sentas antaŭ la vivo, kaj jen li kolektas ĉiujn, por prezenti ilin al la virino, kies sola amo satigos lian koron.

Dezirojn pro amemo, bedaŭrojn pro senutilaj aŭ detruitaj pasioj, tion Sully Prudhomme esprimas per ĉarmegaj strofoj, delikataj, simplaj, plenigitaj per diskreta ĝojo aŭ malĝojo kormovanta. Ŝajnas, ke, en li la pasio havis nur horojn dolĉajn, dolorajn aŭ melankoliajn. Li rifuzis al si mem, diri ĝiajn voluptojn kaj ĝiajn malsanigajn turmentojn.

« *La Soltecoj* », kies titolo montras la suferantan animon de la aŭtoro, enhavas liajn konfidenciojn la plej purajn kaj la plej nuancitajn (1869).

Antaŭ tiu dato, en 1866, li aperigis sonetaron: « *La Provoj* », kie ni povas sekvi la historion de lia penso kaj sento. Post lia revo, alta kaj flama, li diras en ĝi, per grandiozaj esprimoj, sian maltrankvilecon kaj sian doloron. Kaj, nun kiam li kredis,



Sully Prudhomme, kies morton la tutmonda filozofaro ploras, estis unu el la plej profundaj kaj akregaj poetoj. Li vere ne estis, kiel Victor Hugo, grandfama tra la internacia literaturo, nek, kiel François Coppée, popola ĉe la malgranduloj. Li ĝuis famon iom malvastan, apud delikatuloj.


Naskiĝinta en 1830, li laboradis duonon da centjaro. Efektive lia unua versaro aperis en 1865, tio estas « *Stances et poemes* », kiu enhavas « *la vazo*

rompita », por li bedaŭrinde tro divastiĝintan. Poste aperis, inter aliaj verkoj, « *Épreuves; Solitudes; Impressions de la guerre; Destins; Vaines tendresses* », kie la pasio, aŭ nur amema, aŭ ankoraŭ landnacia, estas filozofie esprimita; fine, en 1877, « *Justice* » kaj « *Bonheur* », verkoj tute kaj nur filozofiaj, kiuj, en la tre mallonga amplekso de la « *Soneto* », enhavas multfakajn teoriajn ideojn pri la discio, pri la problemo de la Malbono, de la kaŭzo

(1) En Parizo, la jaron 1839an. Mi trovas en letero skribita de Sully Prudhomme mem al Jules Claretie, la fama literaturisto, tiun kuriozajn biografian. Lia vera nomo estas René-François, Armand Prudhomme. La nomo Sully ne apartenas al li. Ĝi estis alnomo de lia patro. Post la morto de tiu ĉi, lia patrino prenis la tusantan kutimon nomi tiele sian filon, kio igis nedisigeblaj la nomojn Sully kaj Prudhomme, glorigante unu kaj la alian. O. P.

(2) Granda urbo metalurgia de Saône-et-Loire.

de O. PRUDENT kaj Pro BUQUET.



DE LA MAJSTRO.

studojn pri li. Ĉar ili pritraktas la majstron je malsamaj vidpunktoj, ni opinias interesi niajn legantojn, enpresante ambaŭ artikolojn.

li amis, li malesperis, la vivo malkovras al li, kiom ĝi valoras kaj tion, kion ĝi signifas. Ĝi donis al ni la heredaĵon de niaj prapatroj; laŭ nia vico ni devas tion transirigi al niaj filoj, ankoraŭ plimultigita kaj plibonigita. Esti fiera pro si mem, bona por la aliaj, pia por la patrolando, jen estas la devoj, kiujn li ordonas al la homoj, en versoj, kie, bedaŭrinde, la energieco elprenas el la poezieco.

Krom « *La Vanaj Amemoj* », en kiuj li kolektis, en 1885, la strofojn kortuŝantajn aŭ malgravajn — kelkajn sensignifajn — kiujn li estis, de l' apero de « *La Solecoj* » disjetinta, liaj lastaj verkoj montras pli kaj pli emon filozofian.

« *La Fataloj* » (« *Les Destins* ») 1872, provas solvi la ekscitantajn kaj eternajn problemojn starigitajn antaŭ la homa spirito. Kial malbono ekzistas? Kiu estas ĝia deveno? ĝia utilo, aŭ, almenaŭ, ĝia rolo? Jen estas la malsevera, submeligema respondo de la poeto: « Estas nek bono, nek malbono en la mondo La malbono estas nur la malordo tra la harmonio, kiun ni elpensas — tute home, cetere. El la malbono, per kontrasto, elmontriĝas la bono. Ĉar ni mortas, ni estas kapablaj ami ».

La poemoj de « *La Justeco* » kaj « *La Feliĉo* » rezultis de la postaj evolucioj de la pensisto tra la spekulativaj regionoj. La amemo sentita por la estaĵoj de la unuaj horoj plilarĝiĝas kaj aliformiĝas per la vivado kaj, kvazaŭ vespere, la poeto havas la bonegan deziron, instrui al la homaro la vojojn, per kiuj ĝi iros al la feliĉo.

Impresoj de milito (1870) — *La ribelo de la Floroj* — *La prismo* (1886) — *Pri la esprimo en la Belartoj* (1888) — *Pripensoj pri la arto de la versoj* (1892) — *La Testamento poezia*, proze, plenigas la nomaron de liaj verkoj. Tiuj gravaj skribaĵoj, en kiuj la abstraktaj spekulacioj penas preni formon poezian, ne daŭrigos la nomon de Sully Prudhomme, ni kredas. Sed estas certe, ke ĝi vivados per la libroj, en kiujn la poeto metis, delikate, sian animon amantan, sinceran, sekrete vunditan kaj dolĉe plendeman.

* * *

En 1881, la Franca Akademio proponis al li la honoron, kiun li trovis premeganta — famulo tro modesta! — okupi la apogseĝon de La Fontaine. (1)

En 1901, alia gloro aŭreolis lian frunton: la premio Nobel estis donata al li.

Ĉiu scias la uzon, kiun li faris de tio.

Malavara gesto inspirita de lia simpatio por la junuloj laboremaj kaj de lia amo por la literaturo: li fondis premion, kiun la Societo de la Literaturistoj (*Société des Gens de Lettres*) devas pagi jare al la juna poeto, ne sufiĉe riĉa por publikigi siajn versojn, en kiu la juĝantaro estos trovinta talenton burĝonantan aŭ ekflorantan.

* * *

Sama kiel lia vivo kaj lia verkaro, simple kaj noble dediĉitaj al la kulto de l' arto kaj de la pensado homa, dolĉa morto finis la longajn kaj kruelajn korpajn dolorojn de la poeto (lastan septembron) — morto kiu esperigas al ni, ke lia iama deziro plenumiĝis:

« Vi, kiu helpas min dum mia agonio,
« Nenion diru al mi;
« Faru, ke mi aŭdu iom da harmonio,
« Kaj mi mortos bone... »

La 14^{an} de Okt. 1907.

O. PRUDENT.

* * * * *

cela, de l' antaŭvideco. Tiujn ĉi lastajn ideojn li reprenis « exprofesso », ne plu per delikataj versajoj, sed per senornama kaj, por tiel diri, nuda prozaĵo en « *Les Causes finales — La finaj kaŭzoj* », (akrega disputado kun D^{ro} Richet), kaj en « *La Religion de Pascal — La religio de Paskal'* ». Li ankaŭ zorgis akurate skribi, antaŭ sia morto, du testamentojn literaturajn: unu pri la religio, la dua pri la versfarado. En la unua li aprobis la teorion de la evolucio laŭ ĝiaj precipaj trajtoj, sed ne laŭ la senco

de Materialismo mehanika. Efektive li akceptas la celan kaŭzon, kiel energion enhavatan en Universo, ne kiel eksteran Prudenton. Tio sufiĉas por loki lin inter la Idealistoj. En la dua testamento, li forĵetas la poezion nomatan « dekadenta » (malprogresanta), ne pro malestimo, sed pro amo al la klareco. Li restarigas la tradiciajn regulojn, kiel la klasikuloj kaj la Parnasanoj ilin observis. Li ŝatas sendube Stéphane Malarmé kaj I. Grehg, sed li pli ŝatas Boileau kaj Hugo, ĉe la klasik-romantistoj; Leconte

(1) La lastan printempon, liaj amikoj havis la koran penson, festi la dudek kvinan datrevenon de tiu glora okazo. Post poezia parolado de Fr. Coppée, kaj lego de soneto de G. Lafenestre, la fidelaj amikoj kaj admirantoj de la majstro prezentis al li medalon memorigan, ŝulditan al la talento de la konata gravuristo Chaplain.

de Lisle kaj sin mem, ĉe la Parnasanoj. Li juĝas, ke sendube la versistoj bezonas pli flekseblajn regulojn, sed li samtempe rimarkas, ke tro flekseblaj reguloj estas la sama afero, ol nenia regulo. De tio sekvas, ke la bonaj versistoj skribos bonajn versojn per de si mem faritaj reguloj, nesimplaj sed tre zorge observataj. De tio sekvas, ke la malbonaj versistoj skribados malbonajn versojn senformajn per nenia regulo krom persona fantazio. De la multforma verso ĝis la senforma verso, efektive, la vojo estas glitiga.

Tio estas tre rimarkinda en Sully Prudhomme, ke poezie kaj filozofie, li estas homo de meza aĝo (ne laŭ la historia senco kompreneble); homo de « oportunismo », de « posibilismo » (laŭ la politika senco); homo, laŭ la koro de Leibniz, kiu unuigas la malplej unuigeblajn sed tamen tre unuigindajn aferojn, tio estas: la romantismo kun la « Parnasismo », la kredo kun la pozitivismo, la revolucio kun la « konservatismo » fine la plej libera kaj maltimega novemo kun la akademia spirito. Li estis samtempe kaj sen kontraŭdiro, la amiko de Jules Lemaitre kaj François Coppée unupartite, kaj aliparte de Zola kaj Anatole France. Li « burĝeze », por tiel diri, akceptis la premion Nobel, kaj socialiste donacis ĝin al la laboremaj junuloj malpli riĉaj ol li mem. Tio ne estas la flanko malplej honorinda de tiu honorplena vivo. Ni sekvu iom tiun ĉi poetan, filozofian kaj ankaŭ socialan vivon sur la trioblan vojon, kie li paralele marŝadis. Bedaŭrinde ni ne povas ekaperigi tie ĉi versojn mem. La « sonetoj » estas tre favore, oni eĉ dirus tro favore konataj de ĉiuj literaturamantoj: la « vazo rompita », la « glavo », la « buĉraĵo » la « sonĝo » k. t. p. estas parkere ĉie deklamataj.

Jen lerta traduko de tiu ĉi lasta soneto, de D^{ro} G. Philippet (eltirita el « Lingvo internacia »).

SONĜO.

En sonĝo mi vidis plugiston: « mem zorgu pri l' pano »,
Li diris, « mem plugu, mi ne plu disŝutos la semon ».
« Ekteksu mem! » diris teksisto, « mi sentas dormemon »,
Kaj la masonisto: « Nun prenu la trulon en mano! »

Lasite de l' homoj, post tiu terura admono,
Mi trenis post mi la malbenon kaj la anatemon;
Kaj kiam mi preĝis por peti la Dikompatemon,
Stariĝis, je ĉiu angulo de vojo, leono....

Mi frotis l' okulojn, dubante pri l' nova taglumo:
La greno ekĝermis, maŝinoj teksadis kun zumo,
Kaj la domfaristoj laboris kun gaja fervoro.

Mi, plena de ĝojo, komprenis el tiaj memoroj,
Ke eĉ fierulo ne vivus sen homaj laboroj:
De tiam la tutan homaron mi amis el koro.

Jen ankoraŭ soneto, kiu resumas la tre teruran problemon pri la justeco de la ĉie, ĉiam, kaj oni povas aldoni, ĉiel, ĉial uzata buĉmetodo, kiun ni tro favore nomas « civilizacio ». Atesto pri buĉemeco, jen la unua rajto de l' homo!

LA GLAVO.

Kiu estas tiu ĉi fera tranĉilo, fleksebla, akra, pinta?
Nek ventron de l' tero profund' ĝi traboras,
Nek ŝtonon ĝi fendas, nek arbojn ĝi hakas.
Kiun arton ĝi servis, kiun malbonon ĝi kontraŭbatalis?

Ĉu ĝi estas vera ilo? Neniel. Ĉar la virta homo
Ĝin malamas. Ne estas la ŝvito, kiu ĝin ŝvitigas;
Tio, kion oni ŝatas en ĝi estas la plej malnova rustaĵo.
— « Tranĉilo je la blua ruĝa fulmo, kiu vi estas? »

— « Mi estas la glavo, ilo de la entombigistoj,
« Kaj, kiel la formigilo en la manoj de la statufaristoj
« Mi kuras ĉe la pugno de la reĝoj, tranĉante la homon laŭ ilia
[plezuro.]

« Nu! mi devas, ĉiujare, eltranĉi la floron de la rasoj
« Ĝis la horo, kiam la homa viando al si faros kirason
« Plu fortan ol la fero, per la sankta Rajto. »

Ĉu oni permesos al mi, fine, kelkajn pripensojn pri la filozofia poezio, kiun Sully Prudhomme tiel lume reprezentis. Estas sendube tre bedaŭrinde, ke filozofio kaj poezio ne plu estas sama afero, kiel ĉe la epoko de Heraklito kaj eĉ de Lukrecio. Vane Lamartine en sia « Fatalo de la franca poezio » ploregas pri la eksedziĝo ĵus parolita. Li mem penis por unuigi la du aferojn. La eksperimento ne estis plene decidiga. Li naskis nenion krom komunajn ideojn pri Dio kaj la senmorteco de la animo. Sammaniere Alfred de Musset kantis la esperon al Dio laŭ la ĉie uzata formo; tre respektinda, tre laŭdinda, sed tamen tre malprofunda kaj malakra filozofio. Victor Hugo sendube pli bone sukcesis. Li sensanceliĝe enkondukis en sian teruregan versaĵon: « Tio kion diras la ombra buŝo » (ce que dit la bouche d'ombre) kaj aliloken, la fantomajn vidpunktojn de la orientaj mitoskribistoj; vera poezio, tre malklara, sed samtempe tre kortuŝanta. Alfred de Vigny, en « les Destinées », (fataloj), kaj poste Leconte de Lisle, en « Kaino », sekvis tre libere, aŭ maltimege transformis kaj karikature priskribis, la hebre-kristanajn vidpunktojn pri la naskiĝo, la vivo kaj la morto. Ili tre varme diris insultojn al Fatalo. Tio ankaŭ estas vera poezio, malhela kaj tremiganta. Aliparte, Heine kaj Carducci, kontraŭstarigis la harmonian vivon de Grekujo, kontraŭ la mensoga malharmonio de Kristanujo. Tio ĉi ankoraŭ estas malvera, malklara, sed filozofia, sed samtempe vere poezia. Kontraŭe, Sully Prudhomme, kiel pozitivist lerninto, intencas esti nur scienculo. Li elĵetas la mitojn. Li zorgas, esti ĉiam klara. Bedaŭrinde sammezure, kiel li trafas la nuran veron, li necesege maltrafas la poezion, kiu, nature, malamas la lumon. De tio sekvas, ke li estas iom malvarma, almenaŭ ke lia varmeco estas tute interna kaj malfacile sentebla de la ordinaraj legantoj, de la popola aŭskultantaro. Efektive li ne estis, kaj eble neniam estos popola verkisto. Tio ĉi kompreneble nenion eltiras el lia pura kaj alta gloro.

P. BUQUET,
Profesoro de Filozofio.

(1) Ni estas feliĉaj enregistri sukceson por nia distinginda kunlaboranto, Pro Paul Buquet. Li ĵus ricevis la unuan premion, por la departemento de la Côte-d'Or, de konkurso organizita de granda pariza gazeto pri la edukado de la demokrataro.

Ni aldonas niajn gratulojn al tiuj jam ricevitajn de la eminenta profesoro de la liceo Monge (Beaune). T. I. M.



BEGINEJO DE BRUĜO.

Beginejoj en Belglando

Verkita de VAN DER BIEST-ANDELHOF, el Antverpeno.

La turistoj, vojaĝantaj en la flandra parto de Belglando, ne preterlasas viziti en iaj urboj religiajn virinajn societojn, kiujn oni nomas *beginejoj*.

Ili estas kvazaŭ apartaj malgrandaj urbetoj, kie, la plej ofte, meze de ombrajta herbejo, borderita per altaj arboj, altiĝas koketa preĝejo, ĉirkaŭ kiu orde staras la dometoj de la beginoj, treege pure tenataj, kaj ordinare ĉirkaŭitaj per ridetantaj ĝardenetoj. Kelkaj beginejoj, kiel tiu de Bruĝo, kaj la granda beginejo de Gento, estas protektitaj per muroj kaj fosaĵoj. La beginejoj estas graciaj kaj kvietaj lokoj, kie homo, forkurinta la bruan movadon de la nuntempa urbo, povas pace mediti kaj revii.

Oni ne ĝuste scias, de kiam datumiĝas la deveno de la beginejoj. Laŭ la plej kredindaj informoj ili estas fonditaj de sankta Bego (Flandre: *Begga*), patrino de la Franka kortegmastro Pepino de Herstal'o, kiu vivis dum la 7^a centjaro; de tie la nomoj: Begino, beginejo.

La beginejoj estas institutoj, kiuj celas la religian vivon, la bonfaradon kaj honoran staton por virinoj el ĉiuj klasoj de la societo.

Tra la pasintaj jaroj la beginejoj restis kvazaŭ senŝanĝe. Belglando posedas ĉirkaŭ 20 da tiuj societoj, enhavantaj pli ol 1500 beginojn, el kiuj preskaŭ 1000 en Gento sole. La aliaj troviĝas en Bruĝo, Antverpeno, Liero, Mehleno, Kortrejko, k. c.

Por esti akceptata en beginejo, estas postulata, ke fraŭlino aŭ vidvino alportu ateston de senriproĉa konduto, kaj posedu ian havon. Krom tio, la postulantino devas pagi sumon da almenaŭ 500 frankoj por la loĝado kaj por la konservado de la preĝejo. La definitiva akcepto okazas nur post du jaroj, per voĉdono. La beginoj ja estas submetataj al regulo, kaj precipe al sia superulino, nomata «granda sinjorino», sed ili ne estas ligitaj per ĉiamaj promesoj. Tamen tre malofte beginoj forlasas la instituton.

Dum sia novictempo la junaj beginoj vivas multe en grandaj loĝejoj, kiujn mi nomos laŭ la flandra nomo: *konventoj*. Kiam la loĝantinoj de tiuj konventoj ne estas en la preĝejo, oni trovas ilin en la komuna laborĉambrego, kie ili faras punton, brodas aŭ kudras. Post ses jaroj ĉiu begino estas rajtigita apartiĝi en privatan dometon, kiu portas, krom numero, nomon de sanktulo aŭ de sanktulino. En kelkaj beginejoj la fratinoj povas subluigi parton de sia loĝejo al sinjorinoj, ne partoprenantaj en la instituto.

Ĉiutage, du- aŭ trifoje, la beginoj devas ĉeesti la diservon en la preĝejo, matene ĉirkaŭ la 5^a, vespere je la krepusko. La vidaĵo en tiu diservo de multnombraj virinoj, vestitaj per antikva flandra «falio» aŭ kapvestitaj per granda



INTERNO DE BEGINEJO.

blanka kapuĉo, havas ion solenan kaj kortuŝantan.

La plej vizitindaj beginejoj estas la beginejo de Bruĝo, la du beginejoj de Gento kaj tiu de Antverpeno.

La Bruĝa beginejo troviĝas je la sud-okcidenta flanko de la urbo, ne malproksime de la ĉarma kaj pentrinda lago de Amo (Flandre: *Minnewater*). Oni nomas ĝin *princa Beginejo*, ĉar ĝi estas fondita de Johano de Konstantinopolo, grafino de Flandro. Ĝi portas ankaŭ la nomon *korto de l' Vinber-ejo*, laŭ la loko, kie ĝi estas konstruita. Antikva dokumento (1197) certigas, ke tie troviĝis kampo, superflue produktinta vinberojn (1).

La granda beginejo de Gento kiu antaŭ 1875 troviĝis apud la Bruĝa urbordego, estas translokigita je la nord-oriento de la urbo. Ĝi gastigas 700 loĝantinojn; ĝi enhavas 18 konventojn kaj belan preĝejon, kien alradias la stratoj. Ĉiuj domoj, kvankam duetaĝaj kaj konstruitaj per ruĝaj brikoj laŭ la gotika stilo, estas ĉiuj malsimilaj, kaj prezentas multe da diverseco.


La malgranda beginejo (Violetstrato) ekzistas

tia kia, de la fino de la 17^a centjaro. Ĝiaj koketaj dometoj, kies verdaj fenestraj fermiloj aperas ĉarme

sur la neĝblankeco de l' muroj, estas tute similaj. Ĝi enhavas ankaŭ kelkajn konventojn, inter kiuj estas tre vizitinda la *konvento de l' Floroj* (Flandre: *konvent ter Bloemen*).

Tre koketa, tre originala, estas la Antverpena beginejo (Ruĝa strato), kie la graciaj dometoj en mezepoka flandra stilo ĉirkaŭas grandan, ridetantan ĝardenon.

La beginejoj de la belga flandra lando ofte inspiris pentristojn, poetojn kaj romanverkistojn. Inter la verkistoj mi citu JAN VAN BEERS, al kiu la flandra literaturo ŝuldas la belegan poezion *Tante Geertruid* (Onklino Gertrudo), TONY BERGMANN, kiu skribis beletan skizon pri la beginejo de Liero, sia naskiĝa urbo, kaj GEORGES RODENBACH, kiu dediĉis kelkajn kortuŝantajn paĝojn al la beginejo kaj la beginoj de Bruĝo, en sia rimarkinda kaj rimarkita verko *Bruges la morte*, la



STRATO EN BEGINEJO.

senviva Bruĝo.

VAN DER BIEST-ANDELHOF,
(Belgujo).



Francbrita Kristnaska legendo.

Oni ne povas ĉiam venki la Diablon, sed tio estas ebla, kiam eksonoras la unua bato de la noktomeza horo, dum la Kristnaska nokto. Aŭskultu do tion, kio okazis al Johano Skuarn el S^o Michel (*elp. Miŝel.*) en Grève.

Ian tagon, kiam li vagis sur la marbordo de S^o Michel, li renkontis mizeran vojiranton, kiu, por danki lin pro la donaco de panpeco, eksciigis al li la rimedon, por gajni la riĉecon kaj la feliĉecon. Ja, li sciigis al li, ke meze de la marbordo, staras kastelo loĝata de princino, bela kiel feino kaj riĉa kiel la dekdu plej nobelaj el Franclando. La inferaj spiritoj malliberigis ŝin sub la akvoj. Ĉe la Kristnaska nokto la maro malfermiĝas kaj ebligas, ke oni vidu la kastelon; se iu povus eniri ĝin, kaj kapti en la funda ĉambro magian vergeton, li povus fariĝi la edzo de la princino. Sed estus necese, ke oni estu preninta la vergeton antaŭ la lasta bato de la noktomeza horo, se ne, la maro revenus subakvigi la kastelon, kaj la malmitega serĉanto estus aliformigita en statuon.

Skuarn' decidis provi la aventuron. Je la noktomeza horo, la maro forfluis, kiel kurteno kiun oni fortiras, kaj vidigis kastelon. Ĝi brilegis je lumoj. Per unu salto Skuarn' estas apud ĝi, li trairas la pordon. La unua ĉambro estis plena je multevaloraj mebloj, je kofroj plenaj je oro kaj arĝento, ĉie

ĉirkaŭe staris la statuoj de la aventurserĉintoj, kiuj ne povis pli malproksimen iri. Dua ĉambro estis defendata de leonoj, drakoj kaj monstroj kun grincantaj dentoj. Johano Skuarn' estas pereonta, se li ŝanceliĝos!

Kiam la sesa bato de la noktomeza horo sonoris, li sukcesis trapasi meze de la ensorĉitaj bestoj, kiuj disiris, kaj li eniris pli luksan ĉambron, kie estas maraj fraŭlinoj belaj kiel feinoj, kaj vestitaj kiel princinoj; li estis preta por partopreni en ilia rondodanco, kiam li ekvidis, tute ĉe la fundo, la magian vergeton. Li tuj liberigis sin el la belaj manoj, kiuj retenas lin, kaj fine li trafis la celon tiel avidatan.

Tiam sonoris la dekdua bato de la noktomeza horo.

Sed jam Skuarn' havas la magian vergeton, kaj li ne plu timas ion. Je lia voĉo, la muganta maro forfluas de la kastelo, kaj la inferaj demonoj, definitive venkitaj, forkuras kun krioj, kiuj tremigis la ŝtonegojn. La princino liberigita proponis sian manon al la kuraĝa savinto.

Tiam okazis belegaj edziĝofestoj, kaj Johano Skuarn', pro dankemo al la sanktuloj, kiuj estis protektintaj lin, uzis la duonon de la trezoroj, por konstruigi kapelon por ĉefangelo Sankto Michel.

D^o M. P. G.

(1) Ĝis la 17^a centjaro troviĝis vinberoj en diversaj regionoj de Belglando, inter alie sur la montetoj apud Loveno. Nuntempe la vinbero nur estas kulturata proksime de Hujo (Huy), 3-4 kilometrojn laŭlonge la Meŭzo.

Kaprico.

De ALFRED DE MUSSET. ⁽¹⁾

SERVISTO, anoncante.

Srino de Leri.

MATILDO.

Mi malpermesis, ke oni akceptu iun.

ŜAVINJI.

Ne, ne, ŝi eniru. Kial nenium akcepti?

MATILDO.

Nu! fine, sinjoro, ĉu oni povas ekscii la nomon de l' farintino de tiu ĉi monsaketo.

SCENO III^a.

MATILDO, ŜAVINJI, Srino DE LERI, en bala tualetto.

ŜAVINJI.

Venu, sinjorino, venu, mi petas; oni ne povas alveni pli ĝustatempe. Matildo venas elparoli senpripensaĵon, kiu, vere, valoras sian oran pezon. Imagu al vi, ke al ŝi mi montras tiun ĉi monsaketon...

Srino DE LERI.

Ha! Ĝi ne estas malbeleta. Daŭrigu.

ŜAVINJI.

Tiun ĉi monsaketon al ŝi mi montras; ŝi ĝin rigardas, ĝin palpas, ĝin returnas, kaj ĝin redonante al mi, ĉu vi scias, kion ŝi diras? Ŝi al mi demandas, kiukolora ĝi estas!

Srino DE LERI.

Nu! Ĝi estas blua.

ŜAVINJI.

He! jes; ĝi estas blua... tio estas certa... kaj tio estas precize la ridindaĵo de l' afero... Ĉu vi imagas, ke oni demandas pri tio?

Srino DE LERI.

Tio estas perfekta. Bonan vesperon, kara Matildo; ĉu vi venas hodiaŭ vespere ĉe l' ambasadorejon?

MATILDO.

Ne, mi intencas resti.

ŜAVINJI.

Sed vi ne ridas pri mia rakonto?

Srino DE LERI.

Sed jes ja. Kaj kiu faris ĉi tiun monsaketon? Ha! Mi ĝin rekonas; ĝi estas Srino de Blenvilo. Kiel! vere, vi ne eliras?

ŜAVINJI, malafable.

Per kio vi ĝin rekonas, mi petas?

Srino DE LERI.

Per tio, ke ĝi estas blua. Mi ĝin vidis treniĝantan dum jarcentoj; oni bezonis sep jarojn por ĝin fari, kaj vi juĝas, se en la daŭro de tiu tempo ĝia destino ŝanĝiĝis. Pense ĝi apartenis al tri el miaj konatoj. Trezoron vi havas, Sr^o de Ŝavinji; veran heredon vi ricevis.

ŜAVINJI.

Oni kredus, ke estas nur unu monsaketo en la mondo.

Srino DE LERI.

Ne, sed estas nur unu blua monsaketo. Unue, laŭ mi la blukoloro estas malŝatinda; ĝi nenion signifas; ĝi estas stulta koloro. Mi ne povas erari pri simila objekto; sufiĉas ke mi ĝin vidis unufoje. Kiom mi ŝategas la siringviolan, tiom mi malŝatas la bluan.

MATILDO.

Ĝi estas la koloro de l' konstanteco.

Srino DE LERI.

Sensencaĵo! ĝi estas la koloro de l' perukistoj. Mi venas nur pasante, vi vidas, mi estas en granda uniformo; estas necese, ke oni alvenu frue en tiun landon; estas homamaso, en kiu oni riskas rompi sian kolon. Kial do vi ne venas en ĝin? Tion mi ne preterlasus por unu mondo.

MATILDO.

Mi pri tio ne pensis, kaj nun estas tro malfrue.

Srino DE LERI.

Ne vere, vi havas sufiĉe da tempo. Tial, kara, mi tuj sonorigo. Petu pri robo. Ni pelos el la ĉambro Sr^{on} de Ŝavinji kun lia mebleto. Mi kombas vian hararon, en kiun mi metas du floretojn, kaj mi vin forrabas per mia veturilo. Konsentite, jen afero tute aranĝita.

MATILDO.

Ne hodiaŭ vespere; decide, mi restas.

Srino DE LERI.

Decide? Ĉu tio estas afero antaŭkonkludita? Sr^o de Ŝavinji, dekonduku do Matildon.

ŜAVINJI, malafable.

Mi ne min enmiksas en la aferojn de iu.

Srino DE LERI.

Ho! Ho! Vi ŝatas la blukoloron, laŭŝajne. Nu! aŭskultu, ĉu vi scias, kion mi faros? Donu teon al mi, mi restos ĉi tie.

MATILDO.

Kiom afabla vi estas, kara Ernestino! Ne, mi ne volas senigi la balon je ĝia reĝino. Iru fari valsan

(1) Sekvo. Vidu la Oktobran Numeron.

turnon, kaj revenu je la dek-unua, se vi pensos pri tio ; ni babilados solaj ĉe l' angulo de l' fajrejo, ĉar S^o de Ŝavinji nin lasas.

ŜAVINJI.

Mi ? Tute ne ; mi ne scias, ĉu mi eliros.

S^{ino} DE LERI.

Nu ! Estas konkludite, mi vin lasas. Ha ! Mi forgesis ; ĉu vi eksciis miajn malfeliĉojn ? mi estas ŝtelita kiel en arbaro.

MATILDO.

Ŝtelita ! Kion vi volas diri ?

S^{ino} DE LERI.

Kvar roboj, kara mia, kvar adorindaj roboj, kiuj venis el Londono, perditaj ĉe la dogano. Se vi estus vidinta ilin, tio estas plorinda ; estis unu Perstola kaj unu pulkolora ; neniam oni faros ion similan.

MATILDO.

Mi tre sincere vin kompatas. Oni do konfiskis ilin ?

S^{ino} DE LERI.

Tute ne. Se estus nur tio, mi tiel kriodus, ke oni redonus ilin al mi, ĉar tio estas mortigo. Mi estos nuda tiun ĉi tutan someron. Imagu, ke ili traboris miajn robojn ; ili metis sian sondilon en mian keston, mi ne scias tra kio ; ili faris truojn, en kiujn oni metus unu fingron. Jen tio, kion oni alportis al mi hieraŭ dum mia matenmanĝo.

ŜAVINJI.

Ĉu estis nenia blua, hazarde ?

S^{ino} DE LERI.

Ne, sinjoro, nenia. Adiaŭ, belulino ; mi min montrus nur momente. Mi atingis, mi kredas, mian dekduan gripon dum la vintro, la dek-tria tuj min kaptos. Tuj farinte, mi alkuros kaj enprofundiĝos en viajn brakseĝojn. Ni preparolos doganon, vestaĵojn, ne vere ? Ne, mi estas tute malĝoja, ni sentimentaligiĝos. Fine, tute egale ! Bonan vesperon, sinjoro de l' lazuro..... Se vi min rekondukas, mi ne revenos.

Ŝi eliras.

SCENO IV^a.

ŜAVINJI, MATILDO.

ŜAVINJI.

Kian malfortikan cerbon havas tiu virino ! Vi bone elektas viajn amikinojn.

MATILDO.

Vi volis, ke ŝi supreniru.

ŜAVINJI.

Mi vetus, ke vi kredas ke S^{ino} de Blenvilo faris mian monsaketon.

MATILDO.

Ne, ĉar vi diras la malon.

ŜAVINJI.

Mi estas certa, ke vi ĝin kredas.

MATILDO.

Kaj kial vi pri tio estas certa ?

ŜAVINJI.

Tial ke mi konas vian karakteron, S^{ino} de Leri estas via orakolo ; tia ideo estas absurdaĵo.

MATILDO.

Jen bela komplimento, kiun mi malmulte meritas.

ŜAVINJI.

Ho ! Dio mia, jes ; kaj mi pli ŝatus, se pri tio vi estus nekaŝema anstataŭ kaŝema.

MATILDO.

Sed se mi tion ne kredas, mi ne povas ŝajni, ke mi ĝin kredas, por ŝajni sincera.

ŜAVINJI.

Mi diras, ke vi ĝin kredas ; tio estas skribita sur via vizaĝo.

MATILDO.

Se estas necese, ke mi tion diru, por vin kontentigi, nu ! mi konsentas ; mi ĝin kredas.

ŜAVINJI.

Vi ĝin kredas ? kaj eĉ se tio estus la vero, kio malbona estus en ĝi ?

MATILDO.

Nenio, kaj pro tio mi ne komprenas, kial vi ĝin neus.

ŜAVINJI.

Mi ne ĝin neas ; ŝi faris ĝin.

Li levigas.

Bonan vesperon : eble mi revenos post nelonge, por trinki teon kun via amikino.

MATILDO.

Henriko, ne min lasu tiel.

ŜAVINJI.

Kion signifas *tiel* ? Ĉu ni malpaciĝis ? En tio mi vidas nur ion tre simplan : por mi oni faris monsaketon, kaj mi ĝin portas ; vi demandas al mi, kiu, kaj mi tion diras. Nenio similas malpli al malpaciĝo.

MATILDO.


Kaj se mi petus pri tiu monsaketo, ĉu vi ĝin donacus al mi ?

Daŭrigota.

Tradukita de

JOHANINO FLOURENS,

H. M. de la E. Vagabonda Klubo.



Turismo kaj Tendsporto.

Kiu, vidante la dom-veturilojn de la vagantaj budistoj, ne revis pri la migrado tra la landoj per tiu primitiva ilo, malproksime de la urbaj devigoj kaj antaŭjuĝoj? Ho! vivi en la libera aero, sen zorgoj, halti, reekiri laŭ volo, ĉu tio ne estus idealo!

Dank'al modernaj transportiloj, tiu ĉi idealo iĝas realeco; la biciklo, la disvastiĝo de la boatirado kaj precipe la reĝo de la vojo, la aŭtomobilo ekkrakis la centjarajn rutinojn. Oni pli facile forlasis sian hejmon, kaj laŭ la franca esprimo « Oni ne plu kredas, ke oni estas mortonta, kiam oni forlasis sian preĝejan turon ».

Sed a unua rimedo, la dom-veturilo, ne estas praktika, ĉar ni ŝatas nun la rapidecon; kaj aŭtomobila domo estas multe tro kosta kaj ne oportuna pro troa pezo kaj embaraso.

Pro tio oni imagis rimedon pli praktikan, pli amuzan, malmulte koston, facilan rilate al improvizado kaj realigado, postulantan nenian korporeparadon, kaj kiu, en ekskurso, montras flankojn neatenditajn. Tio estas la Tendsporto (angle: Camping), jam tre praktikata en Britujo kaj Ameriko, kaj kiu komencas alveni en Francujon.

Tre simpla estas la materialo: malpeza tendo netrairebla per pluvo, sufiĉe vasta laŭ la nombro de la turistoj, kelkaj lif-sakoj aŭ litetoj, la necesegaj tualetiloj en tolo, apoteka botoletaro, alkohola lampo. Por la kuirado, nur unu el tiuj kuirilaraj kestoj kun aluminiuj iloj... kaj tio sufiĉas.

Kaj nun dank' al tiu eta materialo ne embarasanta, malmulte kosta, improvizita en kelkaj horoj, vi estas la reĝo de l' mondo! Liberecon, sendependecon absolutan, tiun ĉi ricajon tiel maloftan, vi havas en la mano! Vi povas iri, veni, vin transporti el unu loko en alian, ne zorgante pri la loĝado kaj la provizado, halti antaŭ tia pejzaĝo, kiu plaĉas al vi, forkuri tiun spektaklon, kiu enuas vin, vivi meze de la naturo momentojn alternatajn je agado kaj revado. Kaj se vi pensas, kunporti kun via pakajo grandan provizaĵon da ĝoja humoro, la etaj maloportunaĵoj, eĉ de tiel nova speco de vivado, estos por vi tiom da okazoj de gajeco.

Kaj tiu ĉi ĉarma impresoj, havi nur sin mem kiel estron, tiu ĉi impresoj morala estas tre ŝatinda. Nedubeble ĝi donas al la animo memfidon kaj sentimecon — tiamaniere tiu amuzo kunportas bonegan kaj profitigan lecionon. Certe, kiam, poste, vi reiros al ia alia laboro, vi sentos en vi pli da decideco, netimon por batali kontraŭ la barilojn, animon pli fortikan; kaj ĉio ĉi, tial ke la praktiko de iu sporto, eĉ amuza, estos vin kutiniginta, fidi nur al vi mem, malami kaj venki la malfacilecon, esti ema al iniciato.

Ĉu tio ne estas sufiĉa por decidi vin al tiuj plezuroj, gesamideanoj! Kion vi pensas pri nia standardo flirtanta ĉe la pinto de via tolaĵa hejmo, kiam vi migrados por tiu bela plezuro, la Tendsporto!

L. DE GUESNET.

Cirkaŭ la Kvara Kongreso

16^a-22^a de Aŭgusto 1908.

La bela, saksa ĉefurbo, Dresden', havas tre oportunan situacion. Ĝi estas nek nordgermana, nek suda urbo; ĝuste en bona mezo de Germanujo ĝi kuŝas, facile atingebla por ĉiuj landoj.

Kiel ni jam diris, la Kvaro, kiu aranĝos la kongreson, estas: Dr^o Mybs, Dr^o Schramm, Sino Hankel kaj Sro Arnhold. Tiu ĉi kvaroj ĉion faros, por faciligi al la kongresantoj la vojaĝon kaj la loĝadon. Ni ricevas de ĝi la jenajn sciigojn:

« La Societo por la Interkomunikigo de la Fremduloj (Fremdenverkehrsverein) tre afable proponis al la kvaroj sian helpon; per kunagado kun tiu ĉi Societo la kvaroj aranĝos malkaran restadon al niaj gastoj. Kun kora gastemeco ni ilin atendas, entuziasme ni ilin akceptos! La malnovaj amikoj revidos unu la aliajn, novaj ligoj fariĝos, pli intime la granda familio unuiĝos. En la lando de la scienco tre granda ekspozicio montros la riĉan literaturon de nia lingvo.

Post la kongreso ekskursoj tra Germanujo estos aranĝitaj; ni esperas, ke multaj Esperantistoj partoprenos. Tiuj el ili, kiuj preferas la viziton kaj restadon en trankvila « Esperanta Vilaĝo » trovos en Weisser Hirsch la deziratan ĉarman lokon, veran Esperantistujon. Jam nun oni tie aranĝis kursojn.

La sukceso de niaj entreprenoj dependas de la multnombra apero de la gesamideanoj. Ĉiuj nacioj estu bone reprezentataj! Ni petas, ke oni baldaŭ anoncu sian nomon kaj profesion klare skribitan, kun detala adreso al la Oficejo de la kvaroj, kiu restos ĝis la definitiva translukigo al Dresden (en komenco de somero 1908) ĉe la Prezidanto Dr^o Mybs, Altona a. E., Marktstr. 68. Ankaŭ ne forgesu la donacajn kason kaj la Garantian fondaĵon, ĉar ni bezonas multe da mono. Ni do petas, ke oni sendu ĉiujn monojn al la bankejo Fratoj Arnhold (Gebr. Arnhold Dresden, Waisenhausstrasse, 20 »).

La Kvaro por la Kvaro.

Dr^o MYBS, Dr^o SCHRAMM, MARIE HANKEL, H. ARNHOLD

La kvaroj eldonis tre ĉarman oficialan ilustritan poŝtkarton, kies krsto estas: 1 ekz., 5 Sd; 50 ekz., 0,5 Sm.; 100 ekz.; 2,5 Sm Ni tre rekomendas tiun artecan propagandilon al niaj legantoj.

« **Saksa Esperantisto** » ne plu aperos, por ke ĉiuj penadoj al la sukceso de la kvaroj estu kunagaj. Saĝa decido. (Laŭ *Germana Esperantisto*).

Por Paroli Angle.

Tradukita el la Portugala lingvo.

Tial ke Paŭlo, jam dekkvinjara, ne ankoraŭ sukcesis lerni la unuajn elementojn de la angla lingvo, decidis lia patro sendi lin Anglolandon.

« Tie, devige, li lernos — li pensis. — Nur mi devos lasi lin kelkajn jarojn en kolegio, kaj li revenos konante perfekte la anglan lingvon ». Kaj li sendis lin tien.

Je la momento konduki lin ĉe l' bordo, li diris al li: « Mia filo, mi skribos al vi nur angle; tio estos al mi facila, mi prenos tradukiston. Sed viaflanke vi devos nur skribi al mi je sama lingvo; tiel vi lernos pli rapide ».

Tiel ordonite, tiel okazis; kaj intertempe venis al li el Anglolandon leterojn, kiujn li tradukigis kun fiereco, kaj legis kun atenteco. Kaj kiam Paŭlo celestis dudekjara, la patro ordonis al li reveni Brazillandon.

Li iris akcepti lin ĉe l' bordo, kaj vidis antaŭ si knabegon ruĝan kaj sanan, sed ekfalis pro surprizo, kiam li volis kun li paroli!

La diabla knabo elforgesis la portugalan lingvon!

La patro dum momento malesperis, sed baldaŭ rekuraĝigis, kaj donis profesorojn de portugala lingvo al la filo, kun la devigo nur paroli al li per tiu lingvo, laŭ la Berlitz'a metodo.

La afero rezultis bonege, kaj, post unu jaro de daŭra studado, Paŭlo jam parolis mirinde la portugalan, sian patrolandan lingvon.

Sed, kiel li estis malmulte memorema, li jam elforgesis la anglan!

M. V.

Rudyard Kipling.

La angla verkisto, kiu ĵus ricevis la Nobel'an premion por la literaturo estas unu el la plej kuriozaj spiritoj de nia epoko; oni povas diri, ke li estas la plej bela genio vivanta de Anglujo. Ni komencos en nia proksima numero la presadon de unu rakonto de la fama « Libro de la Junglo », la plej populara el liaj verkoj.

« T. L. M. ».

REABONO Denove ni petas, ke oni bonvolu TUJ RENOVIGI la abonojn, kiuj finiĝas kun tiu numero.

NOVJARAJ DONACOJ.

Kia pli ĉarma donaco por esperantisto, ol agrabla kolekto da rekomendindaj prozaĵoj!

Kaj kiam pli alloga ĝi estas, se ĝi enhavas interesajn bildojn.

Tiaj estas la 2 unuaj kolektoj de « **Tra la Mondo** » (vidu la 4^a kovrilan paĝon), kaj certe tiuj, kiuj ilin ricevos, estos feliĉaj kiel tiuj, al kiuj oni donacis la unuan jaron.

Ni altiras ankaŭ la atenton pri la poŝhorloĝo « l' **Espero** », kies reputacio estas de nun fortike starigita.

Jen ĵus amuzantaj versoj, inspiritaj al sindona profesoro, de tiu bonega hormontrilo, al kiu ĝi estis dankece donacata.

MIAJ KVAR POŜHORLOĜOJ.

En memoro mia, la kalkulon De la poŝhorloĝoj mi retrovis, Kaj la horoj de la vivo, kiel Aro brua de soldatoj, pasis.

La unuan, kiu frapis tiktak', En la infaneco mi ricevis, Tiam mi ĝin streĉis tiel ofte, Ke la nur arĝenta besto.... mortis.

Kiam estis la dudeka jaro, Sur la ventro mia, dua batis Ora poŝhorloĝo, kiun baldaŭ « Ĉe l'onklinon (*) » mi transporti devis

Sur la familia kronometro Poste, horoj de l'edziĝo sonis, Kaj kreskadis mia blanka barbo, Dum senĉese la montriloj turnis,

Tiam, en tirkeston profundegan, Ĝa maljunan ilon mi enmetis, Ĉar de l'Uria la batantan koron Plu neniam aŭdi, mi decidis.

Sed, sub verda flago de l'Espero, Pacajn gelnantojn mi kolektis, Kaj amatan kvaran poŝhorloĝon, En donaco, fine mi ricevis.

Ĝis la fino de vivado mia, Ĝiajn horojn zorge mi rigardos, Kaj, por la frateco de l' popoloj, La restantajn horojn mi elspezos.

BORD.

(*) France oni nomas tiel, popolo, la ejon kie oni monon pruntedonas interŝanĝe je garantiaĵoj. La oficiala nomo estas « **Pieca Monto** ».

Rekomendataj firmoj.

ESPERANTA 80, Rue Mazarine, PARIS 6^e.
RESTORACIO Bona familia kuirado je moderaj prezoj. La mastro parolas kaj instruas Esperanton

ANONCAGENTO. C. A. G. BROWNE, 53 kaj 54, Wych Street, Strand, W. C. London, Anglujo, deziras korespondi pri anonecoj kaj reklamoj. Varbas anonecojn por « **Tra la Mondo** ».

Poŝhorloĝo por Sinjoroj: 30 fr. = 12 Sm. Poŝhorloĝo por Sinjorinoj: ora, 90 fr. = 36 Sm.; arĝenta 45 fr. = 18 Sm.

GLICERINA DENTPASTO



Kiu ĝin uzis, tiu ĝin uzos.

GELLE FRÈRES

Parfumistoj

PARIS

La firmo korespondas Esperante.

Al samideanoj en la tuta mondo.

GRAVA AVIZO.

NI povas havigi al niaj klientoj kaj korespondantoj ĉiujn librojn esperantajn kaj ĉiujn librojn **NE** esperantajn.
 NI akceptas abonojn por ĉiuj gazetoj en la mondo.
 NI aĉetas malnovajn librojn kaj gazetojn en Esperanto.
 NI sendas niajn katalogojn senpage.

Librairie de l'Esperanto
 (Internacia esperantista librejo)
 15, Rue Montmartre
 Paris.

Nova adreso ➡➡➡

Internacia Scienca Revuo

Oficiala Monata Organo de la

Internacia Scienca Asocio Esperantista

Administracio kaj Redakcio:

SCIENCA OFICEJO, 8, RUE BOVY-LYSBERG,
 Ĝenevo-Svislando.

Specimeno senpage laŭ peto.

Jara abono: 2.75 Sm. (2 spesmitoj 75 spesdekoj).

Unu numero: 25 spesdekoj

Oni abonas ĉe la *Scienca Oficejo*, 8, rue Bovy-Lysberg, Ĝenevo (Svisujo) aŭ ĉe *Möller & Borel*, Berlino (Germanujo), *G. Warnier & Cie* Parizo (Francujo), « *Brita Esperantista Asocio* » Londono (Anglujo), *Raffaello Giusti*, Livorno (Italujo), *M. Arct*, Warszawa (Polujo), *J. Espasa*, Barcelona (Hispanujo), *A. F. Høst & Søn*, Kjøbenhavn (Danujo).

Librairie de l'Esperanto

15, rue Montmartre, Paris

VIDI ĈI SUPREN.

FLOR' ESPERANTA
 LIKORO DE L'INTERLIGO
 (FORTIGA KAJ DIGESTIGA)

La analizo provas la bonajn kvalitojn de tiu-ĉi higiena likoro
 ĉi meritas de la konfido kaj la preferon de la Popoloj

TROYES-FRANCE L. GUYOU & J. FÈVRE

MARKO LIVERITA.
CHABLIS QUINA
 EL MALNOVA ENLANDA VINO.

Kiel ĉiuj preparaĵoj kun kinkono, la CHABLIS QUINA, deponas maljunigante,
 sed tamen ĝi konservas tute siajn eminentajn higienajn proprecojn

LIVERITA LAŬ LA LEĜO. L. GUYOU & J. FÈVRE
 TIU VINO NE ESTAS MEDIKAMENTO. TROYES

LA INTERNACIA TRINKAĴO!

Viskio Esperanto

Registered trade mark N° 270,042. Marque déposée N° 13,195
 Registered Label No 272,434

Bonvolu observi la verdan stelon kaj la nomon **ESPERANTO** sur la afiŝeto, kiu estas desegnita kiel propagandilo.

Buchanan, Scott & C°

GARTHLAND STREET,
 GLASGOW (Skotlando).
 Telegrafa adreso: Esperanto - Glaegow.

MILKA VELMA NOISETTINE Suchard

LA BONGUSTEGAJ
 ĈOKOLADOJ
 POR MANMANĜI.



ESPERANTINO

Digestiga likoro
 Alprenita je la Esperantista Kongreso. Genève 19

Prezo: FRANCUJE. — 11 f 50 la kesto da 2 botel
 Sen kosto pri transporto kaj impostoj.

ALILANDE. — 4 f ĉiu bote prenita en S^t Etienne, impostoj kaj transporto plu.

Generala Tenejo por Francujo kaj Fremdujo
J. B. Brunon-Chauvet
 S^t Etienne (France)

Skribu LEGBLE — Rememorigu ĈIAM pri via [adreso.

ESPERANTAJ ORGANOJ.

Ĝo Esperantista. — Praktika kaj komerca. Ĉe S^o Karl Steier, Plan-Ufer 41, Berlin S, Deutschland. Jare, 2 markoj (1 Sm.).

Esperanta Ligilo. — Monata revuo por blinduloj per Esperanta Braille'a sistemo. 3 f. — (1,20 Sm.) Ĉe S^o Cart, 12, Rue Soufflot, Paris.

Esperanto. — Duonmonata. Aĉetbla ĉe multaj stacidomoj kaj publikaj ĵurnalvendejoj en ĉiuj landoj. 3 fr. (1,20 Sm.) 8, Rue Bovy-Lysberg, Genève (Svisujo).

Espero Katolika. — Tute Esperante. Unu No afrankita 0f. 50; Francujo, 4 fr.; alilande 5 fr. Presejo Barbot, 15, r. Etienne Pallu, Tours (France). (1,60 au 2 Sm.).

Espero Pacifista. — Monata organo de l'Esperantista Societo por la Paco. Jara abono 5 fr. (2 Sm.). Sin turni al S^o Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

Laboro. — Monata buleno de Tutmonda Laboro Societo. Jare 3 fr. (1,20 Sm.), ĉe S^o Paul Blaise, 4, rue Bourg-Tibourg, Paris.

La Revuo. — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D^{ro} Zamenhof. — ĉe Hachette k. K^o, 79 Boulevard St-Germain. Paris. — Jare, Francujo: Fr. 6, ceteraj landoj: Fr. 7. (2,80 Sm.).

Socia internacia Revuo. — Priraktas ĉion, kio interesas la homaran vivadon. Jare 6 fr. (2,40 Sm.). Adm. 45, rue de Saintonge, Paris-3e.

Germana Esperantisto

Oficiala organo de la Germana Esperantista Societo

kun literatura aldono.

« LIBERAJ HOROJ »

aperas ĉiumonate en lingvoj Esperanta kaj Germana kaj celas disvastigi la Esperantan movadon en ĉiuj germanlingvaj landoj.

Jara abonprezo Mk. 3.00 (1,50 Sm.)

Redakcio kaj administracio:

ESPERANTO VERLAG MOLLER & BOREL,
Berlin, S. Prinzenstr. 95.

PROPAGANDAJ ORGANOJ.

Afrika Esperantisto. — Senpage. 4, Rue du Marché, Alger, Algérie. Por afrikaj samideanoj.

The American Esperanto Journal. — Jare 2 Sm., 5 fr. Boulevard Station, Boston, Mass. (U.S.A.).

Amerika Esperantisto: 1 dol. (2 Sm.). L'Amerika Esperantisto, 1239 Michigan Ave, Chicago.

Antaŭen Esperantistoj. — Hispane kaj Esperante. — Organo de la Perua esperantista societo: 3 fr. (1,20 Sm.). Administranto, Antonio Alvarado, apoteko del Teatro. Calle Lártiga, Lima (Peruo).

La Belga Sonorilo. — Bonega malnova propaganda revuo: Esperante, france, flandre. Sciigoj — Literaturo — Scienco.

Eliras duonmonate. Abono: 6 fr. (2,40 Sm.) jare. 53, Rue de Ten Bosch, Bruxelles. La abono komencas nepre la 1^{an} de Septembro.

The British Esperantist. — Jare 4 fr. — Ĉe B. E. A., 13, Arundel Street, Strand, London.

Brazilia Revuo Esperantista. — Portugale kaj Esperante. 6 fr. (2,40 Sm.). — Ĉe la administracio, Rua da Assembleia, 46, Rio de Janeiro, au ĉe « Tra la Mondo ».

Časopis Českých Esperantistu. — Monata (krom en aŭgusto kaj septembro). Boheme kaj Esperante. Jare 3 fr. 75. (1,50 Sm.). Adm. kaj Red.: Praha II — 313 — Karlovo namesti.

L'Espérantiste. — France kaj Esperante redaktata, oficiala revuo de la S f p E: 24 paĝoj da teksto, 8 paĝoj da kovriloj kun multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiuspecaj esperantistaj verkoj. Abono: Francujo 3 fr.; alilande: 3,50 fr. (1,40 Sm.). Administracio: Louviers, (Eure), France.

Esperantisten. — Svede kaj Esperante. Organo de la Svedaj Esperantistoj, fondita de la Stockolma Klubo. Ĉe P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm. 3 fr. 75 ĉiujare (1,50 Sm.); aparta No: 35 cent. (14 Sd.)

Esperanto. — Hungare kaj Esperante. Sciencia kaj literatura. 4 fr. (1,60 Sm.). Ĉe S^o Marich Agoston, Papnövelde-Uteza 6, Budapest, IV.

Finna Esperantisto. — Ilarejo esperantista, Helsinski, Finnlando. 1 fr. 50 (0,60 Sm.) por la 1a jaro.

Japana Esperantisto. — Monata, Japane kaj Esperante, kun ilustraĵoj. Jar. 4 fr. (1,60 Sm.). — N^o 1a, 3 ĉome, Jurakō, Kozimacik, Tokio.

La Lumo. — 5 fr. (2 Sm.) Ĉe Ivan Nenkov, strato sv. gorska, n^o 2299 V. Tirnovo, Bulgarujo.

Pola Esperantisto. — Pole kaj Esperante. — 2 fr. 50 (1 Sm.) Akademicka 26, Lemberg, Galicio.

Ruslanda Esperantisto. — Ĉiumonata organo de la S-to « Espero »; — Jara abono 8 fr.: (3,20 Sm.) Ruslando, St Peterburgo, B. Podjačeskaja, 24, al la S^o « Espero. »

Suno Hispana. — Hispane kaj Esperante. Abono 3 fr. (1,20 Sm.) Administracio kaj redakcio: Avellanias, 11, presejo — Valencia (España).

Vvisa Espero. — France kaj Esperante — 2 fr. (0,80 Sm.). Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

ESPERANTEM AJ ORGANOJ.

Les Annales politiques et littéraires. — Jare: 10 f. (4 Sm.) 15, rue St-Georges, Paris. Abono 10 fojojn repagita per la profitoj de l' « Carnet de la mutualité des Annales » (Libreto de l' reciproka apogo de Annales).

Le Cycliste. — Revuo monata de ciklotekniko kaj de turismo. — Dro.: P. de Vivie, 5, Rue de la Préfecture, Saint-Etienne. — Abono: Francujo 1 fr. 80, alilande 2 fr. 40. (1 Sm.). Ĉiuj informoj pri la bicikloj kun meĥanismo por ŝanĝi la rapidumojn kaj pri higieno ciklista.

De Lusthof. — Ĉiumonata multilustrata revuo. — Ĝi ekzistas de 5 jaroj, kaj estas la plej bela kaj la plej malkara el la flandraj ĵurnaloj.

Jara abono: 2 frankoj. (0,80 Sm.).

Sin turni al la presisto de *Tra la Mondo*, Bruĝo, Belglando.

La plume Sténographique de France. — Universala revuo ilustrata de Stenografio kaj Daktilografio — Dro: L. P. Canet, Adm., 15, Rue Manigne, Limoges. — Ĉiulandaj sciigoj pri ĉio rilatanta la rapidan skribadon kaj la skribmaŝinojn; ĉiusistema stenografio, literatura kaj historia fako, ilustraĵoj, ludoj, k. t. p. Petu specimenon.

➡➡➡ BULONJA KAJ GENEVA KONGRESOJ.

➡➡➡ 6 numeroj de « Tra la Mondo »: 49 Ilustraĵoj.

Ili formas, kun la raporto pri la *Tria*, senkompareblan ilustritan kolekton pri niaj kongresoj.

3 fr. (1,20 Sm.) senpere ĉe nia administracio.

➡➡➡ UNUA JARO DE « TRA LA MONDO »

Kompletaj kolektoj. 6,40 Sm.
Restas ankoraŭ 5, akireblaj nur senpere, kolektoj nekompletaj:

1^e mankas la Aprila N^o. 3,20 Sm.
Restas ankoraŭ 2, akireblaj nur senpere.

2^e mankas la Aprila kaj Maja N^o.j. 2,40 Sm.

➡➡➡ DUA JARO DE « TRA LA MONDO »

Sen specialaj kondiĉoj. 3,20 Sm.

➡➡➡ Binditaj kolektoj.

Dua Jaro, afrankite 4,5 Sm.

Tous les Sports. — Oficiala Gazeto de l' Unuigantaro de la Societoj Francaj de Sportoj Atletaj (100,000 anojn) D^o Raoul Fabens, 29, Rue N.-D. de Nazareth, Paris. — Konstanta rubriko en Esperanto de ĉiulandaj kunlaborantoj. Jarabono: Paris 9 fr.; Dep. 10 fr.; Alil. 12 fr. — Por U. S. F. S. anoj jare: Paris 5 fr.; Dep. 6 fr.; alil. 8 fr. — Unu numero 0.15 en francaj stacidomoj. Petu spec (1 fr. = 0,40 Sm.)

LA PLUS LOGIQUE des Méthodes appliquée à LA PLUS SIMPLE des langues suivant LES PLUS MODERNES des principes d'enseignement des langues.

Méthode Palmer

Livre de 100 pages: fr. 1.25 (0,50 Sm.).
Franco: Belgique, fr. 1.35. — Etranger, fr. 1,50
VERVIERS, Place Verte, 20.

LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ

eliranta la 15-an de ĉiu monato

48 paĝoj (13 × 20 cm.), nur en Esperanto.

LITERATURA ALDONO: 16 paĝoj.

JARA ABONO: 7 fr. 50 (3 sm.)

ADMINISTRACIO:

Preso Esperantista Societo,
33, Rue Lacépède, Paris.

Specimena numero estas senpage ricevebla.

Juna Esperantisto

MONATA GAZETO

por Junuloj, Instruistoj
kaj Esperanto-lernantoj.

Jara abono: 2 fr. 50 (1 Sm.).

Administracio: Preso Esperantista Societo,
33, Rue Lacépède, Paris.

Specimena numero estas senpage ricevebla.

Fandejo por presiloj DEBERNY kaj K^o

58, Rue d'Hauteville — PARIS

Kompleta instalo de presejoj. Granda elekto pri skribliteroj, tekstoj kaj ĉiuspecaj fantaziaĵoj. Preslitoj kun supersignoj specialaj por ĉiuj fremdaj lingvoj kaj ESPERANTO. La fandejo DEBERNY kaj K^o sendos, laŭ peto, presprovaĵojn el ĉiuj siaj serioj en kiuj ĝi posedas la specialajn supersignojn por ESPERANTO.

EUGÈNE MONTROSIER, Gérant.
A. J. WITTERYCK, Presisto, Bruĝo.